

Věra Barandovská-Frank:

Conlangs – (novaj) planlingvoj (AIS kurso, 1 studunuo)

1. Enkonduke

Esperantlingvanoj kaj germanlingvanoj kutime uzas la terminon „*planlingvo*“/“*Plansprache*“, kreitan de aŭstra terminologo Eugen Wüster en 1931, por indiki la manieron de ekesto de Esperanto kaj de aliaj „laŭplane“ konstruitaj lingvoj, sendepende de tio, ĉu ili servu kiel helplingvoj, artaĵoj, eksperimentoj ktp.. Dum la termino „planlingvoj“ pli-malpli stabiligis en Eŭropo, en Usono ĝi estis praktike nekonata, ĉar ĝi ne aperadis en anglalingva literaturo. Kun enkonduko de interreto en Usono – kaj sekve en la mondo – disvastiĝis la esprimo „conlangs“ (Constructed Languages), do „konstruitaj lingvoj“, kio praktike estas sinonimo por „planlingvo“ en vasta senco.

La ĝenerala termino *conlangs* ampleksas ĉiujn konstruitajn lingvojn, egale kiucele ili ekestis kaj al kio ili servas. La aŭtoroj, uzantoj kaj simpatiantoj de conlangs estas nomataj *conlangers*. Karakterizas tion ekz. la sekva klarigo sub <http://encyclopedia.thefreedictionary.com/language>: “*An artificial or constructed language (known colloquially as a conlang among aficionados), is a language whose vocabulary and grammar were specifically devised by an individual or small group, rather than having naturally evolved as part of a culture as with natural languages. Some are designed for use in human communication (usually to function as international auxiliary languages), but others are created for use in fiction, linguistic experimentation, secrecy (codes), or for the experience of doing so. Conlangers differ on whether linguistic creation of the latter kind is to be considered an art or a hobby. These languages are sometimes associated with constructed worlds.*” (“Artefarita aŭ konstruita lingvo [inter ŝatantoj populare konata kiel conlang], estas lingvo, kies vortaro kaj gramatiko estis speciale projektitaj de individuo aŭ de malgranda grupo, pli {kutime} ol esti nature evoluiĝintaj kiel parto de kulturo kun naturaj lingvoj. Kelkaj estas projektataj por uzo en homa komunikado [kutime por funkcii kiel internaciaj helplingvoj], sed aliaj estas kreataj por uzo en fikcio, lingva eksperimentado, sekretumo [kodoj], aŭ por akiri spertojn pri tia farado. Conlangers malsamopiniis en tio, ĉu la laste nomata lingvistika kreado estu konsiderata arto aŭ hobbio. Tiuj lingvoj estas kelkfoje asociataj kun konstruitaj mondoj.”)

2. Komencoj en interreto

La unuaj eksperimentoj kun interreto en Usono datiĝas ekde 1969, en la nun konata formo ĝi stabiligis en 1983. Pri komencoj de interreta erao en interlingvistiko raportis Dan Maxwell (1992): En la jaro 1990 ekfunkciis pere de elektronika poŝto diskutrondo pri planlingvoj “Constructed Language Mailing List” (vidu la arĥivon sub <http://listserv.brown.edu/archives/conlang.html>), organizita de John. B. Ross, kun keldek membroj, krom Usonanoj temis pri interesitoj el Kanado, Britio, Aŭstralio, Nederlando, Danlando kaj Germanio. La plej ofte diskutitaj temoj estis:

- (1) kelkaj specifaj planligvoj, en la grupo troviĝis uzantoj de Esperanto, Glosa kaj Loglan-Lojban
- (2) uzo de planlingvo en perkomputila tradukado
- (3) kreado de novaj lingvoj por internacia komunikado, ekz. Volksgid, Vorlin
- (4) lingvokreado kiel nova artoformo
- (5) kreado de lingvoj por fantaziaj mondoj kiel tiu de “The Lord of the Rings”
- (6) revuo pli planlingvoj “Journal of Planned Languages” de Rick Harrison
- (7) kreado de plurlingva vortaro de dumil bazaj anglaj vortoj kun traduko en planlingvojn

La diskutlingvo estis, memkompreneble, la angla, do partopreni povis, kiel Maxwell bele diris, “tiuj, kiuj ne trovas la kutiman anglalingvecon de tiu rondo tro alta baro” kaj kiuj ...”havas la komputilajn erojn bezonatajn por elektronika poŝto”.

Tiun ĉi agadon forte antaŭenpuŝis la invento de tuttera tekstaĵo (ttt = www por WorldWideWeb), kiun lanĉis Brito Tim Berners Lake por svisa entrepreno CERN en 1989, ĝi publikiĝis en 1991, en 1993 estis plibonigita en Usono kaj ekde 1994 plene establiĝis en interreto. Ankaŭ ĝi dekomence funkcias en la angla lingvo kaj havas, pro pli bonaj komputilaĵoj, multe pli da uzantoj en Usono ol ie ajn alie (Silicon Valley estas senkonkurence la plej giganta monda produkto de komputilteknologioj). Jam ekzistantaj aŭ ĵus naskiĝantaj komunumoj de interlingvemuloj prompte kreis siajn paĝojn ĉe ttt, kiu ebligis tujan disvastigon.

Termino “Constructed Languages”, mallongige *conlangs*, do “konstruitaj lingvoj” iĝis en interreto ĝenerale akceptata supernocio. Diversaj subkategorioj, kiuj tiam amasiĝis, kutime ne respektis diferencon inter *maniero* kaj *celo* de la lingvokonstruado. Ekzemple, la membroj de unu el la plej malnovaj grupoj *Projecto Auxilingua* (1996-2005) atestis sian aktivecon en la kampoj de Auxlangs (auxiliary languages), Artlangs (art languages), Planlangs (planned languages), Devlangs (developped languages) kaj Worldlangs (world languages) – evidente kelkaj el la indikitaj kampoj trakovras sin. En 1996 el “Constructed Languages Mailing List” elpartiĝis “Auxiliary Languages Mailing List” por kreado, pridiskutado kaj uzado de internaciaj helplingvoj. En la reto poste aperis aro da eseoj kaj specialaj paĝoj pri conlangs.

2.1. Historia eseo de Donald Harlow

Sub titolo „How to Built a Language“ (kiel konstrui lingvon) ne kaŝiĝas recepto por lingvokonstruado, sed historie-interlingvistika eseo. Enretigis ĝin usona esperantisto Donald Harlow (1942-2008) en la jaro 2000, kun aparta permeso kopii kaj uzi ĝin kun fontoindiko (<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/EBook/chap03.html>). La aŭtoro sentis bezonon ne nur starigi listojn kaj ligilojn, sed ankaŭ kompili koherajn informojn pri la plej gravaj kaj konataj ekzistantaj planlingvoj. Tio estis nepre utila ago, ĉar neinformita interretumanto, vidanta ekz. la paĝon de Richard Kennaway, povas jes ja sekvi alfabetajn listojn de konstruitaj lingvoj kaj informiĝi pri unuopaj projektoj, sed ne pritaksi ilian gravecon aŭ malkovri rilatojn. La eseo taŭgas kiel informa enkonduko kaj estas kompletigita per bibliografiaj indikoj. La prefaco klarigas aprioran kaj aposterioran principon de lingvokonstruado kun kelkaj ekzemploj kaj resumas ĝian eŭropan antaŭhistorion. Sekvas unuopaj ĉapitroj pri principoj, historio kaj nuna stato de Volapük, Esperanto, Ido, Occidental, Basic English, Novial, Interglossa kaj Glosa, Interlingua, Loglan-Lojban, Neo kaj Klingon. Eŭropano eble miras pri envicigo de la lastaj tri, kiuj, male al la antaŭe pritraktitaj, ne estas internaciaj helplingvoj (kiel Harlow ĝuste indikas, Loglan ekestis por testi la Sapir-Whorf hipotezon, Neo mortis kun sia aŭtoro kaj Klingon estis konstruita por filmserio “Star Trek”), sed ili estas en Usono tre popularaj. La laboro de Harlow ne estas esence originala, sed ĝi estis unu el la unuaj tiaspecaj disponeblaj en interreto¹.

2.2. Kelkaj kolektoj de planlingvoj

2.2.1. Projecto Auxilingua

Iniciatinto de tiu ĉi grupo estis membro de la supre menciita reta diskutrondo Jay Bowks (Jacinto Javier Bowks de la Rosa), usona lignvoinstruisto, kiu, lerninte planlingvojn Esperanto, Latino sine flexione kaj Interlingua, lanĉinte projekton de helplingvo “Auxilingua” en 1979 kaj poste kelkajn aliajn, koncentriĝis al kolektado de informoj pri helplingvoj (Auxlangs). Sur la retpaĝo, kiun li nomis laŭ sia unua projekto “Projecto Auxilingua” li estis

¹ Iom poste (2004) estis starigita paĝo <http://www.lingweenie.net/conlist.pl?maklang>, enhavanta dekon da similaj eseoj de diversaj aŭtoroj.

kolektinta informojn pri planlingvoj kaj registrinta interesitojn pri ili, precipe ankaŭ aŭtorojn de novaj projektoj. Li komencis modeste per listo de malnovaj projektoj, bazita ĉefe sur la libro de Pei (1958), kiun li daŭre kompletigis per informoj ne nur pri malnovaj, sed ankaŭ pri novaj projektoj. La paĝo alportis komence de ĉi-jarmilo (komp. Barandovská-Frank 2003) minimuman informon pri 68 projektoj ekestintaj inter 1734 - 1995 kaj pli detalajn indikojn kun alipaĝaj ligiloj pri 36 aliaj, ekestintaj ĝis la jaro 2000, ekz. Romanova (David Crandall 2000), Esperando (Jay Bowks 2000), Esperanto sen fleksio (Rick Harrison 1999), Frater2 (Paul Bartlett 1997), Pluranto (Softex Ltd. 1997), Latino moderne (David Stark 1996), Ekspreso (Jay Bowks 1996), Sen:espera (Jeffrey Henning 1995), Lingua Franca Nova (George Boeree 1995) kaj EuroLang (Philipp Hunt 1995). En la rubriko “Members of Auxiliary Language Community“ estis ĉ. 250 interesitoj kun interreta adreso, 64% da ili usonanoj. En la jaro 2005 la paĝon kunkreis deko da helpantoj. En la kategorio de helplingvoj registriĝis ĉ. 650 lingvoj, la plej novaj estis Choton (Pascal Kramm 2004), Ygyde (A. Nowicki & P. Hassel-Zein 2004), « 353 » (Marcello Martinelli 2003), « 2004 » (Jacques Dehée 2003), Inter-esperanto/Baza (Greg Hoover 2003), Fasile (B. Breitenbach 2001) kaj Romanica (Josu Lavin 2001). La listo de interlingvistoj (kun pli aŭ malpli da biografiaj indikoj) kreskis al 1120 personoj, inkludante ankaŭ diversampleksajn informojn pri mortintaj pioniroj de planlingvaj movadoj. La tria listo enhavis bibliografion de interlingvistikaj periodaĵoj kaj libroj. Bowks komence kolektis ankaŭ informojn pri alispecaj lingvoprojektoj, precipe pri Artlangs (ankoraŭ en 2002 enestis 38 da ili), poste specialiĝis nur pri helplingvoj, kies dokumentado ŝajnis esti pli superrigardebla, sed kun disvastigo kaj plibonigo de interretaj kontaktoj ili pli kaj pli amasiĝis. En 2005 Bowks rezignis pri la kolektado kaj forlasis la projekton por oferti siajn fortojn al Vikipedio en Interlingua. La paĝo <http://www.auxilingua.org/> ankoraŭ ekzistas, sed ne plu estas aktualigata.

2.2.2. *Bogart Chris' Conlang Webpages*

Inter la unuaj, kiuj klopodis laŭcele superrigardigi la ekzistantajn planlingvojn kaj lingvokreadon publikigatan en naŭdekaj jaroj, estis Christopher A. Bogart, tiam studento de komputilscienco en Oregono, specialiĝinta pri programlingvoj kaj specialaj lingvoj pri kognitiva modeligo. En sia listo de “Constructed Human Languages” sub <http://www.quetzal.com/conlang.html> li uzis kategoriojn: Artistic, Experimental, Logical, Personal, Esperanto & Reforms, In Actual Use, International Communication, Fiction: Tolkien, Fiction: Star Trek, Fiction: Other, Historical, Latin Reform/Revival kaj Not Listed Elsewhere. La plej ampleksa estas lia listo de fikciaj lingvoj. En la grupo de « Aktuale uzataj lingvoj » apud Esperanto kaj Glosa aperis fikcia lingvo Klingon (Marc Okrand 1967), eksperimentaj Láadan (Suzette Haden Elgin 1982), Loglan-Lojban (James Cooke Brown 1955, rev. 1987), sed ankaŭ Volapük² kaj stenografio Dutton's Speedwords³ (Reginald J.G. Dutton 1935). Estas tute specife por la interreta erao, ke tiuj ĉi du lingvoj travivas renesancon kaj ke precipe usonanoj remalkovras kaj revigligas projektojn, en Eŭropo longe forgesitajn. (ekz. „Yahoo Mailing List for Volapük aficionados“ registris komence de nia jarmilo centon da personoj). En la kategorio « Conlangs for International Communication » troviĝis, krom eŭrope kutimaj helplingvoj, ankaŭ “The Elephant's Memory, an interactive visual language” (Timothy Ingen Housz 1994-1996)⁴ kaj UNL (Universal Network Language, pivota lingvo por duonaŭtomata tradukado, projekto de Unuiĝintaj Nacioj el 1996)⁵. Dekon da projektoj, kiuj ial ne taŭgis por la de li starigitaj kategorioj, metis Bogart sub « Not Listed Elsewhere », kie aperas i.a. minimumigita angla lingvo Basic English (Charles Kay Ogden 1930)⁶ apud

² interreta kurso sub <http://personal.southern.edu/~caviness/Volapuk/VoIVifik/volvif00.html>

³ vortaro sub <http://www2.cmp.uea.ac.uk/~jrk/conlang.dir/Speedwords.dict>

⁴ <http://www.khm.de/~timot/PageElephant.html>

⁵ http://www.doku.info/doku_article_53.html

⁶ http://de.wikipedia.org/wiki/Basic_English

lingvo por fikcia mondo de teonanoj, Teonaht (Sally Caves 1998)⁷. La paĝo ne plu estas aktualigita post 1998; post ĝi ekestis pluraj similaj de diversaj aŭtoroj, ni menciuj nur “Ailanto’s Language Page”, “Chandler James’ Scattered Tongues Site” kaj “Artificial Language Lab” de Richard Harrison.

2.2.3. Kennaway Richard’s Constructed Languages pages

Sub <http://www2.cmp.uea.ac.uk/~jrk/conlang.html> ofertis Dr. Richard Kennaway, brita universitata docento specialiĝinta pri artefarita inteligento, alfabetan liston de planlingvoj. Ĝi ekestis en 1996, enhavis 270 conlangs en la jaro 2001, 290 en la jaro 2002 kaj 312 en la jaro 2005. Parto de la kolektita materialo kun ligiloj estas identaj kun la paĝoj de Richard Harrison kaj de Jeffrey Henning (vidu sube 3.3.2 kaj 3.4). La listo donas mallongajn karakterizilojn de unuopaj projektoj, por detaloj oni devas alkliki la nomon kaj estas konektitaj kun la originala retpaĝo. Multaj el la konektoj nun ne plu funkcias. La paĝo, fine de naŭdekaj jaroj prezentata kiel unu el la plej ampleksaj en la reto, utilas, se la uzanto scias, kion li volas serĉi – el la alfabeto ordigo ja ne klaras, ĉu temas pri helplingvo, lingvo arta, fantazia, literatura, eksterterana aŭ alia. Enestas la plej konataj helplingvoj, Tolkienaj lingvoj, la Klingona kaj multe da fikciaj lingvoj. Aparte estas listigitaj kelkaj konstruitaj skribsistemoj, kelkaj fikciaj mondoj, kelkaj reformitaj etnolingvoj (Bokmål, Nynorsk, la Hebrea, la Sanskrita), kelkaj naturaj lingvoj (la Baska, Chinook, Mingo, uralaj lingvoj) kaj ligiloj al diversaj paĝoj pri lingvokonstruado, lingvaj statistikoj, lingvogenado kaj perkomputila instruado. La lasta aktualigo datiĝas de 2005.

2.3. Langmaker – metiejo kaj arkivejo por planlingvoj

La plej imponan kolekton de conlangs kaj la plej ampleksan oferton de servoj havas profesie administrata portalo “Langmaker” (sub <http://www.langmaker.com>) de Jeffrey Henning. Li interesiĝis pri conlangs ekde junaĝo, en 1982 li publikigis sian unuan fantazian gnomlingvon Karklak; sekvis pluraj aliaj, la plej konataj estas Fith, Dublex kaj Kali-Sise. En 1995 li startis publikadon de reta revuo « Model languages ». Ties unua numero enhavis la intertempe famiĝintan enkondukon en lingvohobiadon « An introduction to the hobby of model languages »:

“Some people build model airplanes, some craft model trains and some... well, they invent model languages. Model languages can be everything from a few words of made-up slang to a rigorously developed system of interrelated imaginary tongues. It is not a hobby many people know about, since model languages cannot be flown in the park like a model airplane or displayed in full glory in the basement like a model railroad. Model languages exist on paper or in computer files and may be shared only with a few close friends or may be used to give depth to imaginary worlds read or watched by millions.” (“Kelkaj homoj konstruas flugmaŝin-modelojn, kelkaj modelajn trajnojn kaj kelkaj ... nu, ili inventas modelajn lingvojn. Modelaj lingvoj povas esti ĉio ekde kelkaj vortoj de elpensita slango ĝis rigore evoluigita sistemo de interrilataj imagaj lingvaĵoj. Tio estas hobbio, kiun multaj homoj ne konas, ĉar la modelaj lingvoj ne povas esti flugantaj en la parko kiel modelaj flugmaŝinoj aŭ prezentataj en plena gloro en la teretaĝo kiel modela fervojo. Modelaj lingvoj ekzistas surpapere aŭ en komputilaj datenoj kaj nur kelkaj malmultaj intimaj amikoj povas kunposedi ilin, aŭ ili povas esti uzataj por pliprofundigi imagatajn mondojn privilegatajn aŭ rigardatajn de milionoj.”)

Same kiel aliaj kolektantoj de lingvoprojektoj, Henning estis rimarkinta, ke la nombro de internaciaj helplingvoj kaj eksperimentaj planlingvoj estas eta kompare al tiuj kreataj “just for fun”, do por propra plezuro, por amika rondo, por fantazia lando aŭ virtuala mondo. Tiel same kiel oni fabrikas trajnomodelojn, oni kreu lingvojn – jen simpatia kaj nobla hobbio, kies ŝatantoj ricevas tra interreto elstarajn eblojn por publikigo, diskonigo kaj kontaktigo. Henning

⁷ <http://www.frontiernet.net/~scaves/teonaht.html>

ekkonis novan tendencon, kuraĝigis la aŭtorojn, kolektis, pridiskutis kaj komentis ĉiuspecajn senditajn conlangs (kaj malnovajn kaj novajn) kaj katalogis ilin en superrigarda databazo, ĉiun kun mallonga karakterizo kaj ligilo al koncerna retpaĝo. Krome li kreis apartajn dosierarojn por skribsistemoj, neologismoj, lingvistikaj libroj kaj aliaj materialoj utilaj por lingvokreado. Tre populara estis ankaŭ kolekto de tradukoj de la biblia “Babela teksto” Genesis 11:1-9, en centon da conlangs (<http://www.langmaker.com/babelintro.htm>), kiu iĝis ĝenerale uzata kaj respektata traduka normo por ĉiuj lingvokonstruantoj.

Langmaker, sendube la plej konata kaj plej ofte vizitita ejo koncernanta lingvokonstruadon, ĝis la jaro 2008 registris ĉ. 2000 ĉiuspecajn conlangs, tre multaj el ili estis lanĉitaj pere de interreto. Por ilia klasigo Henning uzis kategoriojn, kiuj respegulis la disponeblan materialon:

- (1) fictional (fikciaj lingvoj, uzataj en literaturo, filmoj, ludoj k.s., karakterizantaj siajn uzantojn)
- (2) fictional diachronic (lingvoj kun ellaborita fikcia historio ekde pralingvo aŭ lingva familio)
- (3) fictional naming (vortaro ellaborita por nomoj de fikciaj homoj, popoloj, landoj, lokoj k.s.)
- (4) international auxiliary (helplingvoj por tuta mondo aŭ parto de ĝi – tradicie Eŭropo)
- (5) logical (lingvoj forigantaj plej eble multan ambiguecon el homa komunikado)
- (6) model (inventitaj por komunikado de fikciaj personoj)
- (7) personal (por persona amuzo)
- (8) philosophical (aprioraj)
- (9) stealth (por sekreta komunikado)
- (10) superset (por anstataŭi naturan lingvon)

Kiel vidiĝas jam el la klasigo, fikciaj (fantaziaj) lingvoj estas la plej disvastigita kategorio. Krom alfabetaj listoj de lingvoj kaj aŭtoroj ekzistis ankaŭ listo kronologia, kiu tradicie komencis per Hildegardis von Bingen en la jaro 1100. En la jaroj 1990 – 2000 eniris 189 nove konstruitaj conlangs, en 2000 – 2003 pli ol kvincent, la portalo pli kaj pli populariĝis kaj ofertis eĉ profesiajn servojn por lingvokonstruado (http://www.langmaker.com/langmaker_services.htm). Al ili apartenis i.a. kontraŭpagaj konsultservoj al aŭtoroj kaj artistoj por kreado de lingvonomoj por fantaziaj kaj sciencfikciaj verkoj, gvidlinioj por ellaboro de tiaj lingvoj, evoluigo de 14 000-vorta vortprovizo, planoj por surmerkatiigi novajn helplingvajn projektojn, helpoj al firmaoj por krei nomojn de novaj produktoj, servoj kaj varo-markoj, kreado de komputilaj programoj laŭ postuloj de klientoj. Tre utila estis ankaŭ ĝisdatigata listo “Index of resources“ kun ligiloj al centoj da parencaj retpaĝoj, kiel Audience, Uglossia, Conlang Manifesto, Conlang IRC Server, Conlangage, EngCore, Artlangers Community, Livejournal Conlangs Community, Neographies Discussion Group, Zompist Bulletin, Elfling, Geofiction Club, Germaniconlang, Ideolengua, Romance Conlang List, Slaviconlang, Ancien Scripts, Yahoo Groups for Conlangs, Language Creation Society kaj multaj aliaj.

En 2007 Langmaker transiris al vikia formato en MediaWiki, kiu ebligis al ĉiuj interresuloj mem eniri kaj kontribui al la paĝaro. Ĝi estis subtenata kaj administrata de volontuloj, specialiĝintaj pri diversaj kampoj, inkluzive de “scouts”, kies tasko estas traktribadi interreton serĉante nove aperintajn conlangs. La paĝo estis blokita en 2008. Unuopaj partoj estas ankoraŭ alireblaj tra ligiloj en vikipedio <http://en.wikipedia.org/wiki/Langmaker>. Langmaker estis revolucia fenomeno en la kampo de lingvokonstruado. Kreado de lingvoprojektoj por filozofiaj, religiaj, artaj, science eksperimentaj kaj praktike lingvokomprenigaj celoj iĝas malpli kaj malpli grava aktiveco, ĉar

en ĉiuj tiuj kampoj stabiligis la Angla kiel faka kaj internacia lingvo. Lingvohobiado iĝis la plej moderna intelektula ŝatokupo.

2.3.1. Kelkaj posteuloj

La tradicion de Langmaker imitas pluraj portaloj kaj vikioj, kiuj ofte estas tiom interkonektitaj, ke la uzanto eniros ŝaltmaŝon kaj perdas orientiĝon. Al ili apartenis ekzemple *Unilang* (<http://www.unilang.org/wiki/index/php/Conlangs>) kun 76 projektoj en julio 2009, kaj *Conlanger*, *The Ascevarium*, <http://www.conlanger.com/>, kolekto de ligiloj al diversaj konstrupaĝoj, kun prefero por romanaj conlangs, starigita en 2006, kie aperis, simile kiel ĉe Henning, recepto por konstrui conlangs, speciale latinidaj surbaze de la vulgara Latina (<http://www.conlanger.com/whatrom.html,12/2006> af Aszev).

Vikiajn servojn por lingvokreantoj krome ofertis ekz. „Conlang Free City“ sub Conlang Wikia kaj „KneeQuickie - a wiki for conlangs, conworlds, and the Zompist Board community“ sub http://wiki.penguindeskjob.com/Main_Page, kun informoj pri auxlangs, artlangs, jokelangoj kaj natlangs. Ĝi estis en 2009 ligita kun

- Conlang Mailing List: <http://listserv.brown.edu/archives/conlang.html>, tradicia diskutejo pri lingvokonstruado
- A conlang FAQ: <http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/9219/conlangfaq.html>, starigita en 2008 de Dean Easton, kiu pacience respondis al la plej oftaj, foje naivaj demandoj pri lingvokonstruado
- Conlang X-Sampa: <http://wiki.penguindeskjob.com/X-SAMPA>, tabeloj kaj speciala konvertigilo por fonetika transskribo Speech Assessment Methods Phonetic Alphabet (ASCII IPA) kiel praktika helpo por priskribo de conlangs
- Polskie forum językotwórców: <http://www.conlanger.fora.pl/>, kompleta forumo por conlangs en pola lingvo
- Conlanger Bboard français: <http://www.conlanger.com/cbbfr/>, forumo en franca lingvo

Multaj el la ligiloj ne plu ekzistas (2012), la koncernaj paĝoj estas atingeblaj aŭ tra <http://www.babelsearch.at/>, aŭ enhave koincidas kun Zompist.

Zompist de Mark Rosenfelder (<http://www.zompist.com/>), kreita en 1996, estas verŝajne la plej granda ĝis nun amase uzata tiaspeca portalo. Komence ĝi koncentriĝis al nura lingvokreado kaj ofertis ligilojn al diversaj lingvistikaj kaj fikcilingvaj paĝoj kaj al vikio Wikiquote. Ĝia ĉefa altiraĵo restis la senpage elŝutebla konstruhelpilo por conlangs „The Language Construction Kit“ kiu estas kvazaŭ kuirlibro por conlangers-komencantoj kaj akireblas ankaŭ libroforme. Nun aperas eĉ ĝia sekvo “Advanced Language Construction”. Dum jaroj la intereskampo de la aŭtoro kreskis, do krom du plej malnovaj ligilkolektoj “Linguistics” kun “sci.lang FAQ“ kaj “Language Construction” enestas “Particular Languages” (kiel la Keĉua kaj diversaj formoj de la Angla), “Comics”, “Scifi”, speciale “Virtual Verduria”, listo de virtualaj mondoj, kiuj ofte havas siajn proprajn vikiojn, ekz. “Almapedia”. Zompist ofertas ligilojn ankaŭ al nelingvistikaj temoj, politiko ktp. Sub “Zompist’s Rant Page” estas babilejo, konektita kun Twitter. Verŝajne la plej grava interkomunikilo de nunaj conlangers estas *Zompist Bboard*, granda forumaro kun speciala subforumo “Conlangery & Conworlds“, kun centoj da eniroj tage, akirebla tra multaj ligiloj, i. a. <http://www.incatena.org/> kaj tra vikipedio <http://en.wikipedia.org/wiki/Zompist.com>.

Frath Wiki (www.frathwiki.com) estas vikio ĉe yahoo kaj ĉe fejsbuko, kun jenaj subpaĝoj: Natural languages, Conlangs, Conscripts, Conworlds, Conlang comparison, Lord's Prayer translations, Conlang relays, Mailing lists, Templates for use in articles. La paĝo por conlangs enhavas jenajn kategoriojn: A posteriori conlangs, A priori conlangs, Albic, Amerindian conlangs, Auxlangs, Conlang Relay, Conlangs based on English, Conlangs by Melroch, Exolangs, Funlangs, Kala, League of lost languages, Languages Spoken in The 8th World, Languages of Ilethes, Languages of Lucus, Loglangs, Nyal, Qatama, Sample Texts,

Types of conlangs (A priori conlang, Artlang, Dadalang, Diachronic conlang, Engineered language, Fictional language, Funlang, International auxiliary language, Logical language, Naturalistic artlang, Philosophical language). Enestas ankaŭ laŭalfabete listigitaj, diversgrade ellaboritaj novaj conlangs, plej ofte kun gramatiko, vortareto kaj kelkaj tekstoj. La paĝo informas pri la aktualaĵoj en la “globala komunumo” de conlangers. Krom la Angla ĝi ekzistas en conlangs Anoé — Carune — Celineŝe (Celíneĉ) — Dalcurian — Dooma — Espiritolan — Háfrig (Avorenta) — Itĉlan — Kazujisha — Liŝĉĉ — Liŝĉĉ (Cyrillic) — Lánc — Nytal — Piscean — Proto-Kunnu-lŭjungo — Sandic — Satirocitan — Tauro-Piscean — Thorsutian — Tower Orthography (Tawyr Oorthaagryfii) — West Germanic (julio 2012).

Unu el la problemoj de la Langmaker-posteuloj estas malkongrua klasigo de planlingvoj kaj koncerna terminologio. La ununura ĝenerale valida termino estas “conlangs”, sed ĉiam denove reklasigataj funlangs, jokelangs, namelangs, naturlangs, fictional conlangs, virtual worldlangs, scifilangs, elflangs, sketchlangs, gnomelangs kaj multaj aliaj terminoj estas lanĉataj tute anarkie. La kvanto kaj kvalito de retpaĝoj pri conlangs nun estas nesuperrigardebla kaj nekontrolebla. Tio validas ankaŭ por koncernaj paĝoj en unuopaj vikipedioj.

Esperanto-Vikipedio ofertas ĉefartikolon «planlingvo», kiu tamen ne helpas solvi la terminologian problemon, ĉar laŭ ĝi, planlingvoj estas nur parto de conlangs: (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Planlingvo>): «*Planlingvo estas konstruita lingvo kreita por uzo en homa komunikado. Tiel ĝi distingiĝas de artaj lingvoj, eksperimentaj lingvoj kaj sekretaj lingvoj. En la komuna uzo la vorto "planlingvo" kelkfoje estas uzata por signifi ĉian ajn paroleblan konstruitan lingvon. Sed en la faka lingvaĵo, la vorto klare havas la pli limigitan difinon, ke nur temas pri lingvo kreita kun la celo de uzo en homa komunikado. ... Estas multaj tipoj de helplingvoj: esperantidoj, volapukidoj, kompromisplanlingvoj, zonaj planlingvoj ktp. Kelkajn planitajn lingvojn oni kutime ne nomas "planlingvoj"; ili estas unuigoj de naciaj dialektoj por servi kiel nacia lingvo al landoj, kie ne estas nature precipa dialekto, ekzemple: nynorsk, la oficiala skriba formo de la Romanĉa, kaj la Indonezia.*» Sekvas ligo al http://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_planlingvoj_kaj_planlingvaj_projektoj, paĝo, kiu baziĝas sur materialoj de Richard Kennaway kaj Langmaker kaj enhavas ĉ. 500 nomojn, parte kun ligoj al la koncernaj retpaĝoj. Krome ekzistas alia retpaĝo (2012) sub http://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_planlingvo kun ĉ. 70 projektoj, ĉiuj kun mallonga esperantlingva karakterizo kaj specimeno, plej ofte kun ligilo al la detala paĝo de la aŭtoro mem. Kvankam la artikolo «planlingvo» ŝajnis ekziston de fakuloj, alivorte aŭtoritatoj, tiuj verdire ankoraŭ mankas. En kelkaj blogoj kaj personaj paĝoj aperas eĉ esprimoj «konlango» kaj «konlangano».

http://en.wikipedia.org/wiki/Constructed_language (2012) ripetas la kutiman difinon de conlang kiel konstruita lingvo en ĝenerala senco, kaj aldonas: “*The expression «planned language» is sometimes used to mean international auxiliary languages and other languages designed for actual use in human communication. Some prefer it to the term "artificial", as that term may have pejorative connotations in some languages. Outside the Esperanto community, the term «language planning» means the prescriptions given to a natural language to standardize it.*” (La esprimo “planlingvo” estas iam uzata kun signifo de internacia helplingvo kaj aliaj lingvoj kreitaj por reala uzo en homa komunikado. Kelkaj preferas ĝin al la termino “artefarita”, ĉar tiu ĉi termino povas havi malbonigan konotacion en kelkaj lingvoj. Ekster la Esperanto-komunumo, la termino “lingvoplanado” indikas la preskribojn donitaj al natura lingvo por normigi ĝin.)

3. Kelkaj kromaktivecoj de lingvokreantoj

3.1. Ĉentradukoj

Tre popularaj ludoj inter lingvokreantoj estas ĉentradukoj, funkciantaj proksimume jene: Originala anglalingva teksto estas tradukita de persono A al ties conlang A (aŭ la teksto

estas lanĉita en conlang A kun kontrolo angla traduko). La tekston en conlang A, kune kun gramatiko kaj vortaro de conlang A, ricevas persono B, kiu tradukas el conlang A al sia conlang B kaj sendas kun gramatiko kaj vortaro de conlang B al persono C, kiu laŭvice faras la samon, ĝis la lasta persono retradukas en la Anglan (aŭ ĉiu el la partoprenantoj faras siavice kontroltradukon en la Anglan). Ofte konkuras du teamoj - venkas tiu, kies retraduko pli alproksimiĝas al la originalo. La plej granda kaj tradicia estas « Conlang Translation Relay », kiu estis ĝis la jaro 2006 dokumentita de Jan van Steenbergem sub http://steen.free.fr/relay10/old_relays.html, nun estas la dokumentoj troveblaj sur rekopiita kaj ĝistadigata paĝo <http://dedalvs.com/relay/oldrelays.html>. La unuan serion de tradukĉenaj konkursoj lanĉis en 1999 Irina kaj Boudewijn Rempt (<http://www.valdyas.org/irina/index.html>). En la unuaj deksep serioj partoprenis entute 133 personoj, la plej multaj kun siaj personaj lingvoj, sed aperis ankaŭ la Klingona, la Latina, Lojban, Volapük, Esperanto. En junio 2012 startis la 19-a tradukĉena konkurso, la detaloj troveblas en Frath Wiki kaj tra babilejoj de Zompist.com.

Detala raporto pri simila ludo « Conlingual Telephone » legeblas sub http://wiki.penguindeskjob.com/Conlingual_Telephone: En la unua konkurserio (2004) konkuris du teamoj kun po ok personoj (Teamo Alpha: Sæm: English - Classical Diŭn, Zoris: Classical Diŭn – Gvaraita, Avaja: Gvaraita – Kazujisha, Doctrellor: Kazujisha - Proto-Drem, Ran: Proto-Drem - Proto-Isles, Shigeru: Proto-Isles - Extmws, Tmeister: Extmws – Lâzhö, Pie Man: Lâzhö – English. Teamo Beta: Raluv: English - Ppalaami', Vampyre_smiles: Ppalaami' – Enki, Rik: Enki – Gevey, Eccentric Iconoclast: Gevey – Mădăšk, Tarasoriku: Mădăšk – Laur, Schwhatever: Laur – Faraneit, Halyihev: Faraneit - Ku Tal, Faiuwle: Ku Tal – English). La lasta tie dokumentita konkurso estis la sepa en 2007.

Ekde 2007, la tradukkonkursoj iĝis parto de aktivecoj de LCS (“Language Creation Society”), la rezultoj estas kutime prezentataj, krom en la interreto, de la aŭtoroj persone ankaŭ dum la realaj konferencoj de LCS.

3.2. Realaj konferencoj

“Conlangers”, kiuj kontaktiĝas precipe en interreto, tamen ankaŭ sentas bezonon persone renkontiĝi. Tion ebligas interalie *Language Creation Society* (LCS), kiu estis fondita en 2007 en Usono, originale de studentoj kaj docentoj de la universitato en Berkeley (Kalifornio), sed intertempe aliĝis al ĝi multaj interesitoj el la tuta mondo. Ĝia retpaĝo <http://conlang.org/>, estas “a site for conlangers, would-be conlangers, those interested in or curious about conlangs, and anything else to do with conlanging” – do la paĝo por ĉiuj, kiuj ajnmaniere interesiĝas pri conlangs, kaj/aŭ mem konstruas ilin.

LCS estas gvidata de profesiaj lingvistoj kaj komputilistoj, inter ili John E. Clifford, emerita profesoro pri filozofio (Universitato St. Louis, Missouri), David G. Durand, adjunkta profesoro pri komputilscienco (Brown Universitato), Sarah L. Higley alias Sally Caves, asociita profesorino pri angla literaturo (Universitato Rochester), And Rosta, docento pri angla lingvistiko (Universitato de Central Lancashire). Funkciuloj estas David Peterson (estro), Sai Emrys, Henrik Theiling, Matt Haupt kaj Donald Booser. La logoo de LCS estas la Babelturo kun eliranta suno en la fono. Ĝia slogano estas “Fiat Lingua” (ekestu lingvo). La oficiala lingvo de la organizaĵo estas la Angla.

Sur la startpaĝo troviĝas kelkaj gravaj materialoj: la jam menciita “*The Language Construction Kit*” de Mark Rosenfelder, lernolibro por la lingvokonstruado kun detalaj informoj pri fonetiko, gramatiko kaj vortprovizo de diversaj lingvoj, pri lingvotipologio, lingvaj familioj ktp. Ĝi estas havebla ankaŭ libroforme kaj estis tradukita en la lingvojn germana, itala kaj portugala. Plue oni tie trovas eseojn “How to Create a Language” de Pablo David Flores, “Essays on Language Design” de Rick Morneau kaj „Glossary of Terms“ de Donald Booser, kiuj donas pli detalajn informojn pri lingvokonstruado, precipe pri diversaj sbutipoj kaj ĉefe pri celoj, al kiuj la lingvoj devas servi. Tion mencias ankaŭ „The Conlang

Manifesto“ David Peterson, kiu klarigas, ke lingvokreado estas interesa kaj nobla hobia, kiun intertempe havas miloj da homoj kaj kiu iĝas pli kaj pli ŝatata.

En la maldekstra kolumno de la retpaĝo troviĝas ligoj al informoj pri membreco, pri lingvokrea literaturo kun ligoj al gravaj libroj kaj retpaĝoj, la ligoj al la blogpaĝo kaj al podkasto de LCS kun aŭdvidaj dokumentoj, arĥivo „Fiat Lingua“ kun dokumentoj pri conlangs, informoj pri retaj lingvoludoj (ekz. „Game of Thrones“), geografia mapo de la lokoj, kie loĝas conlangers, kaldendaro de la eventoj - konferencoj, kunsidoj, ludoj ktp. de conlangers, paĝoj kun fotoj, bildoj kaj dokumentoj pri lingvokreado, ligoj al la plej gravaj lingvokreadaj forumoj (*Conlang mailing list, Conlang FAQ, Auxlang, thIngan-Hol, Lojban, ConlangFacebook, LiveJournal, Twitter, Conlang Board Bulletin, Zompist Board Bulletin*). Krome oni povas legi aŭ aŭskulti intervjuojn kun famaj aŭtoroj de conlangs aŭ kun verkistoj kiuj interesiĝas pri conlangs, kiel Arika Okrent.

La societo krome ofertas profesiajn servojn, kiuj oni povas ricevi aŭ mendi sub koncerna ligilo:

- people.conlang.org: listo de ĉiuj kunlaborantaj conlangers kaj de iliaj conlangs kun koncernaj ligiloj
- store.conlang.org: provizo de libroj kaj aliaj helpiloj por lingvokonstruado. Krome ofertiĝas multaj materialoj ankaŭ por konstruado de “conworlds”, do virtualaj mondoj, kie conlangs funkcias, kun flagoj, blazonoj, himnoj, mapoj, planoj, ktp.
- a guide for new conlangers: informoj pri eniro, kontaktoj kaj kunlaboro en la konstrulingvokomunumoj
- a collection of pedagogical materials: materialoj por instrui aplikatan lingvistikon surbaze de lingvokreado
- a listing of conlang-related research: listo de sciencaj laboraĵoj, akademiaj disertaĵoj, eseoj, recenzoj kaj similaĵoj.

La ĉefa agadperilo estas interreto, tial ankaŭ la realaj konferencoj estas sur la retpaĝo dokumentataj kun fotoj, resumoj, tekstoj kaj videobildoj. La unua “Language Creation Conference” okazis en 2006 en la universitato de Berkeley (Kalifornio). Prezentiĝis ok prelegoj, pritraktantaj diversajn aspektojn de lingvokonstruado ekde gramatiko ĝis apliko. Ankaŭ la dua konferenco en 2007 okazis en Berkeley, kun 11 prelegoj, la tria en 2008 en Brown Universitato, Providence, havis jam 26 prelegojn kun tre variaj temoj historiaj, lingvopriskribaj, psikologiaj, pragmatikaj k.a.. La intereso pri realaj, vivaj kontaktoj de lingvokonstruantoj kreskas kaj transiras la limojn de Usono.

La kvara “Language Creation Conference” okazis en 2011 en Groningen (Nederlando). Partoprenis ĉ. 30 homoj el Usono, Skandinavio, Britio, Germanio, Nederlando, Rusio kaj Turkio, multaj aliaj conlangers povis sekvi la tutan konferencon en reta videobildo kaj tra konferenca retŝaltilo partopreni la diskutojn. La partoprenantoj estis plej grandparte junaj homoj, kiuj krom bonaj konoj de la Angla havis konojn kaj/aŭ scipovojn de aliaj fremdaj kaj konstruitaj lingvoj kaj pri lingvistiko ĝenerale (lingvotipologio, terminologio, gramatiko, fonetiko ktp.). Oni povis aŭskulti kaj pridiskuti 16 prelegojn, kiuj troviĝas sur la retpaĝo de LCS en videoformo, la resumoj kaj fotoj de la prelegantoj estis tie jam unu monaton antaŭ la konferenco. Dum la unua vespero okazis paneldiskuto “Trends in conlanging” kun la plej spertaj kaj longjaraj conlangers kiel David Peterson, Jan van Steenbergen kaj Christophe Grandsire-Coevoets. Dum la dua vespero estis prezentitaj rezultoj de la kvara “Conlang Translation Relay” (conlang-tradukkonkurso), kiun partoprenis 15 aŭtoroj kun siaj lingvoj. La tekstoj kaj tradukoj estas ankaŭ troveblaj sur la retpaĝo de LCS.


LCS estas pruvo de tio, ke multaj, ĉefe junaj homoj profunde interesiĝas pri lingvoj kaj trovas ilin interesaj precipe por eksperimenti, por amuziĝi per konstruado de fantaziaj lingvoj kaj virtualaj mondoj, por konatiĝi kun samhobianoj, por praktiki diversajn retajn ludojn kaj roli kiel parolantoj de inventitaj lingvoj. Ĉar la angla lingvo jam funkcias kiel internacia, nur malgranda parto de conlangers serioze okupiĝas pri helpaj lingvoj (momente

plej ŝatataj estas panslavaj lingvoj kaj la minimumo-lingvo Toki pona), sed kompreneble ĉiuj konas – multaj eĉ scipovas – Esperanton. La ĉefaj motivoj por eniri LCS kaj partopreni ĝiajn konferencojn ne estas lingvopolitikaj kaj lingvohelpaj streboj, sed antaŭ ĉio ĝuo pri lingvokreado kaj partopreno en virtuala lingvokomunumo.

4. *Stabiliĝanta (kruda) divio de conlangs laŭ la celo*

Pri la kategorioj de conlangs klarigas la retpaĝo de LCS (<http://conlang.org>): “Conlangs come in a wide variety although these can be divided primarily into three general areas: **auxlangs** or international auxiliary languages like Esperanto, **engelang** or engineered languages like Ithkuil and Lojban, and **artlang** or artistic languages like Sindarin or Klingon. This is just the tip of the iceberg, and these are simply some of the more widely-known examples of these respective types of conlangs”. Tiu ĉi kruda divido estas nun ĝenerale uzata tra interreto, tial estas konsilinde, por baza orientiĝo, akcepti la ideon pri la tri grupoj: helplingvoj kiel Esperanto, eksperimentaj lingvoj kiel Lojban kaj artaj lingvoj kiel Sindarin kaj Klingon. Kompreneble ekzistas kvanto da conlangs, kiuj ne precize eniras unu el la kategorioj, ekzistas ankaŭ transiraj tipoj kaj ekzistas multegaj aliaj ebloj de klasigo.

Conlanger Claudio Gnoli aranĝis tiun ĉi dividon en triangulon, tial oni nomas tiun ĉi sistemon ankaŭ la “Gnolia triangulo” (http://conlang.wikia.com/wiki/Conlang_terminology).



Tiu ĉi baza skemo estis multfoje reformita, re prilaborita (al heksagono ktp.), sed por baza orientiĝo kaj ĉefe por komencantoj ĝi estas daŭre rekomendinda.

4.1. *Ekzemploj de auxlangs*

4.1.1. *Romanceconlangs*

Ĉar oni ofte uzas interreton kiel arkivejon por alirigi malnovajn, originalajn kaj/aŭ malfacile akireblajn projektojn, tekstojn, revuojn ktp., oni povas trovi historiajn materialojn ekde Descartes, Wilkins ktp. ĝis Latino sine flexione, kaj eĉ sperti novan ondon de intereso pri ili. Tradicie, conlangs surbaze de la Latina, vulgara latina kaj latinidaj (Romanaj) lingvoj estas tre forta grupo ankaŭ en interreto. La latinida bazo estas komprenata kiel grava parto de eŭropeca kulturo kaj heredaĵo de la Romana Imperio.

Ekzistas kelkaj dekoj da organizaĵoj, nomataj „sodalitates“, „societates“, eĉ „academiae“ (granda parto el ili membras en „Societas Circulorum Latinorum“ www.latinitatis.com/vita/circuli.html), kiuj aktive praktikas latinan lingvon, organizas latinajn kongresojn, kunvenojn, lernejojn, feriojn, festivalojn kaj ludojn. La plej multaj celas reenkondukon de la Latina kiel internacia lingvo en praktika ĉiutaga vivo kaj en sciencoj, do okupiĝas pri ĝi vere serioze, sed, konforme al la moda ondo de lingvohobiado oni ofte kreas imitaĵojn de la Romana Imperio, kies influo estas tre forta en Eŭropo kaj tra eŭropecaj lingvoj ankaŭ en Ameriko.

Unu el ili estas „Nova Roma“, fondita 1997 (www.novaroma.org), sur kies retpaĝo legiĝas proksimume jeno: „*Romo metis bazojn de moderna okcidentlanda civilizo... Romo civilizis la mondon kaj ni sentas bezonon rekomenci tiun mision. Nova Roma klopodas revivigi la oran Romanan epokon. Sed tie, kie niaj antaŭuloj agis per glavoj de siaj legioj, ni*

disvastigas la Romanan civilizon kaj kulturon per nia propra virtuala ekzemplo.“ Grava programo de la organizaĵo, nomata „Via Romana“, celas revivigi Romajn arton, kulturon kaj moralajn valorojn, virtojn, kiuj mankas al la hodiaŭa konsumsocio. Per revivigo de la Romana kulturo oni volas resanigi la socion kaj igi ĝin pli bone kompreni siajn civilizajn originojn. La organizaĵo havas kelkcent membrojn, kiuj nomas sin „suverena nacio“. Ĝi loĝas en geografie starigitaj provincoj, kiuj kovras Eŭropon (*Italia* - Italio, *Britannia* – Britio, *Gallia* – Francio, Belgio, Nederlando, *Hibernia* –Irlando, *Hispania* – Hispanio, Portugalio, *Dacia* –Rumanio, *Pannonia* - Hungario, Slovakio, *Sarmatia* - Rusio, *Thule* - Danlando, Svedio, Finnlando, Norvegio, *Venedia* - Pollando. Usono dividiĝas en ok provincojn, Kanado en du, kaj du provincoj estas eĉ en Sudameriko. Ne mankas rekonstruoj de novantikaj kaj mezepokaj komunumoj kaj lingvoj surbaze de la vulgara Latina aŭ diversaj latinidoj.

Multaj aŭtoroj de latinidaj helplingvoj klarigas sian aktivecon per tio, ke la Latina aktive vivas en internaciismoj, kiuj en eŭropa civilizo eniris ĉiujn lingvoj kaj jam estas kompreneblaj, do se oni kolektos tiujn internaciismojn kaj aldonas konforman gramatikon, la internacia helplingvo pretas. Ke jam ekzistas tiaspecaj planlingvoj, ĉefe Interlingua, kreita kun science faka apogo de IALA, tio evidente ne ĝenas novajn aŭtorojn, kiuj venas kun pli-malpli originalaj variantoj de la sama temo. Jen kelkaj ekzemploj.

Romanova

estas interromana lingvo de David Crandall, Robert Hubert kaj Michael Edwards el 1999 (<http://espadiamapas.t35.com/romanova.htm>) Ĝi celas esti senpere komprenebla por parolantoj de Romanaj lingvoj kaj do uzebla por milionoj da homoj, kiuj ĝin ne devas lerni, speciale uzebla por tradukoj tie, kie traduko al Romanaj etnolingvoj estus tro malfacila. Ĝi enhavas radikojn komunajn al Romanaj lingvoj, simplan prononcon, minimuman gramatikon. Specimeno: *Bono dia, i benvenido al Projeto Romanova! Si tu pode leer esto tecsto, donse la lingua nova ce nus clama Romanova sta funsionando multo bien! Nus ave produsido esta lingua con la speransa ce todos los parladores de las linguas roma'nicas modernas podera' comunicar eficazemente entre se. La lingua nova consiste de tres mil vocablos, mas o menos, i elo fu formado di vocablos prendidos di todas las cuatro linguas roma'nicas maiores: el espaniese, el fransiese, el italiiese, i el portugalese.* (Good day, and welcome to the Romanova project! If you can read this text (above), then the new language that we call Romanova is working very well! We have created this language in the hope that all the speakers of the modern Romance languages will be able to communicate efficiently among themselves. The new language consists of three thousand words, more or less, and it was formed from words taken from all four major Romance languages: Spanish, French, Italian, and Portuguese.)” La prezento de Romanova ekzistas en 15 lingvoj, la lernolibro en 4 lingvoj, aldone Angla-Romanova vortaro kaj tekstaro.

Románico

Grupo da usonaj mezlernejoj (iliaj nomoj aperas nek en la informa retejo <http://www.homunculus.com/babel/arománico.html>, nek en la vikipedia artikolo sub <http://en.Vikipedia.org/wiki/Románico>, kiu intertempe estis forigita) eksperimentis komence de nia jarcento kun Esperanto, Ido kaj Interlingua, kaj rezulte venis al latinida prototipo. La lingvo estas plukonstruata laŭ sekvaj reguloj:

(1) la vortprovizo havas latinidan bazon, la vortoderivado estas konsekvenca, antaŭvidebla, “etimologie Romana”, (2) la prononco respektas la Latinan inkluzive de la akcento (3) la gramatiko estas komplete regula kaj pli simpla ol en Eperanto, ekzemple ne ekzistas deklinacio, do la akuzativo estas nedeviga, en la kazo de dubo (ekz. inversa vortordo) uzebla kun prepozicio (4) speciala difina artikolo karakterizas tutan klason da substantivoj (5) verbaj formoj estas distingaj, ili povas esti kaj sintezaj kaj analizaj.

Specimeno: *Saluto, eske vi potan parlar Románico?* (Hello, do you speak Románico?) *Quante kosten equistos? Placeban ad mi komprar equista.* (How much are these? I'd like to buy this one.) *Graticio! Quo? Mi jam pagin por equista!* (Thank you! What? I already paid for this!) *Vi ne donin ad mi quitifatesto.* (You didn't give me a receipt.) *Se vi ne liberifun mi, mia paeso invasun via paeso!* (If you don't let me go, my country invade your country!)

Mondlango, A Language For The Global Village

aperis sub <http://www.ulango.org/english/index.htm>, (en 2002, de He Yafu). Ĝi intencis esti internacia lingvo, apartenanta al la tuta homaro, sen intenco forigi naciajn lingvojn. La unua internacia lingvo ja estas la Angla, sed ĝi estas komprenata de nuraj 10% de la monda populacio. Multaj plendas pri ĝia lern-malfacileco, tial pli taŭgas artefarita lingvo. Jam ekzistanta internacia lingvo Esperanto estas nur malmulte uzata, ĉar ĝi havas kelkajn gravajn difektojn:

(1) mankas q, w, x, y, male enestas supersignoj. (2) La akuzativa *-n* komplikigas la gramatikon, ĉar la vortordo SVO ne ĉiam validas. (3) Esperanto postulas la kongruon de adjektivo kun sia substantivo. (4) La vortkonstruado havas strangajn regulojn, ekzemple ekzistas “federi” kaj “federacio”, sed ne “federo”. (5) Nomoj de animaloj ne estas neŭtraj, sed maskulinaj, oni devas derivi femininon per aparta afikso. (6) 70% de la vortoj devenas el la Latina. Tio estas tro multe. Pli kaj pli granda parto de la homaro ja uzas la Anglan, tial necesas absorbi pli multajn anglajn vortojn. Mondlango forigas la menciitajn difektojn de Esperanto, sed la rezulto estas, surprize, denove latinida.

Specimeno: *Cu yi vizitin urbo V?* (Have you visited the city V?) *Yes, mi esin tie bifoye. Siman al mi, ke ji multe canjisin.* (Yes, I was there twice. It seems to me, it has changed much.) *Kiel ji apelan al yi?* (How did it strike you?) *Multege. Mi tre enjoyin la vizito.* (Very much indeed. I enjoyed the visit very much.) *Kiom longe yi restin tie?* (How long did you stay there?) *Mi restin tie proksume dum un weko.* (I stayed there about a week.) *Kio esin yia impresu pri la urbo V?* (What was your impression about the city V?) *Impreso de mirego, car mi niam supozin, ke ji esan tiel bela.* (An impression of wonder, for I never imagined it is so beautiful)

Arlipo

estis kreita de Lubor Vitek en 2003 (<http://home.tiscali.cz:8080/arlipo/>). La gramatiko ne enhavas esceptojn, ĝi baziĝas sur Esperanto, sed estas pli logika. Ĝi estas taŭga kandidato por esti internacia helplingvo en Eŭropa Unio kaj en Unuiĝintaj Nacioj. Sur la retpaĝo estas gramatiko, vortaro, ekzemplaj esprimoj kaj frazoj, tradukoj kaj eseo pri la neceso de internacia lingvo, kiu komencas jene: “*De ejeso di Esperanto pasit jam plu multe ol cent-dek jari. Dum to tempo Esperanto ... atingit anke certa internacia autorito. Ma il ne plenumit le esperi di sia kreinto L. L. Zamenhof kaj di omna dauriganti pri ila verko. Esperanto haltit dujimvojen kom hobio di pokenombra entuzjori, ma ila praktika utilo esat mikra. Kven restit to nobla ideo pri universala omnehomara lingvo? Pro kio tala mikra sukceso? Sendube, kulpo esat anke en Esperanto ipsa. Eble omna pensema homo, ejokupanta si pri Esperanto, renkontat en il plura reguli kaj vorti, ne esanta felice farita, prijudikante segun postuli, plenumenda da ideala internacia lingvo.*”

Romana

konstruita de Dan Tohatan en 2003, (www.dacris.com/lang/) estas hipoteza lingvo, kia evoluiĝus el la Latina, se ne ekzistus fremdaj influoj: “*Romana e la lingua che io avo designata, basata per l'evoluzione de la lingua Latina, ed altre lingue moderne basate per la lingua Latina. Este una trasformazione radicale de la Latina, ma Romana sta fidele a la Latina classica originale in multi aspeti* (Romana is the language that I designed based on the evolution of Latin, and modern languages that are based on Latin. It is a radical transformation of Latin, but Romana stays faithful to the original classical Latin in many

aspects)” En la reto estas kompeta lernolibro, anglo-Romana kaj Romana-angla vortaro kun 4000 vortoj kaj kelkaj tekstoj.

Brandonian

de Jordan Kay el la jaro 2003 (<http://brandonian.netfirms.com/index.html>) estas helplingvo surbaze de la Latina, Hispana, Portugala kaj Franca. En Brandonian oni povas esprimi fajnajn detalojn, kiuj ne ekzistas en la Angla, ekzemple substantivoj kun konsonanto aŭ *-o* je la fino estas maskulinoj, kun *-a* aŭ *-e* femininoj. La lernolibro komencas jene: “*Bonvinat, viagânt. Estes toh exitat? Deves esté, purcce en pohcs minuts toh aprenédés ah lângè cce si shama oh Brandonyan. Prepare-ti pur ahl aventurre de unne vidde!* (Welcome, traveller. Are you excited? You should be, because in a few minutes you will learn the language called Brandonian. Prepare yourself for the adventure of a lifetime!)” Krom lernolibro, vortaro kaj kelkaj tekstoj oni povas vidi ankaŭ brandonian komikson.

Resume, la intereso pri latinidoj ne ĉesas. Krome oni daŭre klopodas reformi Esperanton, pretendante, ke ĝia “malgranda sukceso” havas lingvistikajn kialojn. Ĝi tamen restas sendube la plej granda (latinida) planlingvo.

4.1.2. Slaviconlangs

Slaviconlangs, do planlingvoj surbaze de slavaj lingvoj, estas tre forta kaj ŝatata interreta grupo, ĉar la komunslava lingvo reale ekzistis kaj dum jarcentoj oni daŭre referencas al ĝi, klopodante imiti ĝin. Ĝia historio komenciĝis kun la misio de makedonaj fratoj Konstantino (Kirilo) kaj Metodo en la jaro 863 al la Grandmoravia Regno, kies princo Rastislav deziris kristanigon en lingvo, komprenebla al lia popolo (ĝis tiam estis uzata la Latina). Konstantin kreis por tiu ĉi origine makedonslava dialekto skribon, kiu ebligis disvastigon de tekstoj al okcidentaj slavoj; simila, verŝajne de liaj disĉiploj kreita skribo ĝis nun uzatas ĉe orientaj kaj sudaj slavoj. La eklezia malnovslava, ĝis nun uzata kiel lingvo de ortodoksa eklezio, estas konsiderata planlingvo, en la senco de planado de korpuso kaj statuso (vidu Janich, 2004, p. 482-483) kaj ĝi ludis gravan lingvopolitikan rolon en la tiel nomata *panslavismo*, t. e. kultura, religia, socia/etna kaj nacia/politika konsciigo de komuneco de ĉiuj slavoj.

La periodo de renesanco kaj humanismo estas karakteriza per komenco de lingvokreado (enkadre de lingvofilozofio) ĝenerale, kaj ĉi-konekte ankaŭ pri lingvopolitikaj intereso. Ekde la 17-a jc. konatas ankaŭ projektoj de panslavaj planlingvoj, kiuj jam per siaj nomoj kiel “tutslava”, “ĝeneralslava”, “komunslava”, “universala slava” aŭ per diversaj variantoj de la vorto “slava” mem indikas, ke ili volas servi al reciproka interkompreniĝo de ĉiuj slavaj popoloj. Iliaj fontoj estis unuflanke la eklezia (malnov- kaj novslava) lingvo, aliflanke la rusa kiel la plej granda slava lingvo, kaj/aŭ diversaj kombinoj, inkludantaj ankaŭ komunajojn en la plej grandaj slavaj lingvoj (la liston vidu ĉe Duliĉenko 1990 kaj Duliĉenko 2010, p. 207). La panslava lingvokreado, kun identaj tendencoj, praktike daŭras ĝis nun en la formo de “slaviconlangs” (la liston vidu ekz. ĉe van Steenbergen sub http://steen.free.fr/slovianski/constructed_slavic_languages.html). Ne mankas tie la *lingvopolitika komponanto*, antaŭvidanta plifortigon de komunslava elemento precipe en Eŭropo.

Unu el la projektoj, ekestintaj inter 1954-1958, estis *Mežduslavjanski jezik* (“Interslava lingvo”) kreita de grupo da ĉeĥoj (Podmele L., Petr J., Podobský J., Příhoda V., Borovka, S., Trnka B., Stuchlík A.). La tekstospecimeno, publikigita ĉe Duliĉenko (1990, p. 301), estas rakonto pri epizodo koncernanta la supre menciitan ekeston de la eklezia malnovslava lingvo, nome la alvenon de la senditoj de Rastislav el la Grandmoravia Regno al la bizanca imperiestro Michail. La elekto de la temo povus esti pruvo de tio, ke panslavismaj ideoj estis daŭre aktualaj dum la kreado de novaj projektoj, sed krome ne estis konataj eksplicite lingvopolitikaj aludoj al slavismo. Des pli surpriza estis trovo de manuskripto « Revolucija v

istoriji interlingvistiki », de esperantisto Podmele, verkita en Mežduslavjanski jezik kaj enhavanta ideojn, kiuj, en siaj principoj, estas hodiaŭ daŭre/ denove aktualaj. Por kompreni la fonon, utilas konatiĝi kun la biografio de Podmele (vidu <http://www.volny.cz/malovec/start300.htm>, http://eo.wikipedia.org/wiki/Jiří_Karen).

Ladislav Podmele (1920-2000) studis historion kaj filozofion en Karola Universitato en Prago. Li laboris kiel gimnazia instruisto kaj docento de la praga Instituto por plua edukado de instruistoj kaj de Esplor-instituto de faka instruado. Liaj unuopaj poemoj kaj rakontoj publikiĝis ekde lia junaĝo en ĉeĥaj gazetoj sub diversaj plumnomoj, plej ofte Jiří Karen⁸. Sub la propra nomo Ladislav Podmele li publikigis fakajn pedagogiajn verkojn. En 1976 li pro kormalsano devis forlasi sian laborlokon kaj ekde tiam li plene dediĉis sin al verkado de poemoj kaj al Esperanto. Podmele sub sia plumnomo Jiří Karen eldonis 17 ĉeĥlingvajn poemkolektojn, kelkaj aperis en Esperanta traduko. Poste li verkis rekte en Esperanto, kontribuis per tradukoj el la ĉeĥa literaturo al gazetoj kaj krome verkis fakajn artikolojn pri etiko kaj literaturo.

Malpli konatas, ke antaŭ ol konvertiĝi al Esperanto, Podmele engaĝiĝis lingve kaj movade por Occidental/Interlingue⁹ kaj Interlingua. Je tiu okazo li ankaŭ konatiĝis kun okcidentalistoj Jaroslav Podobský, Stanislav Borovka kaj Jan Svatopluk Petr, kunaŭtoroj de Mežduslavjanski jezik, ili do jam havis spertojn kaj konojn pri planlingvoj, kiuj baziĝis sur internaciismoj. Podobský, ĉeĥa patriota poeto, instruisto de la rusa lingvo, regis plurajn eŭropajn lingvojn, junaĝe lernis Esperanton kaj Idon kaj krome okupiĝis pri aliaj planlingvoj kiel Latino sine flexione kaj Novial. Sub influo de Podobský aktivis Podmele en Occidental/Interlingue-movado jam dum siaj studentaj jaroj kaj transprenis en 1947 ties informburoon en Prago. Li ankaŭ verkis poemojn kaj tradukojn el la ĉeĥa en Occidental, proponante memstaran literaturan sektion ene de la movado. Ĝis la jaro 1958 li apartenis al la redakcia stabo de “Cosmoglotta”¹⁰ kaj al la plej elstaraj ĉeĥaj aktivistoj. En tiu tempo disvastiĝis en Eŭropo ankaŭ Interlingua de IALA¹¹, kiu estas tre simila al Occidental/Interlingue, sed imponas ĉefe al intelektulaj uzantoj per tio, ke ĝi estis kreita de organizaĵo kuniganta famajn lingvistojn. Podmele, same kiel lia amiko Podobský, transiris al Interlingua kaj iĝis membro de Union Mondial pro Interlingua, al kiu Podobský apartenis ĝis sia morto en 1962.

La spertoj kun Occidental/Interlingue kaj Interlingua/IALA eble influis la ellaboron de Mežduslavjanski jezik en tiu senco, ke ties bazo iĝis internaciismoj: sur la unua nivelo tiuj, kiuj komunas en la plej multaj slavaj lingvoj, kaj, se tie ne regas unueco, Mežduslavjanski jezik transprenas internaciismojn eŭropajn – latindevenajn kaj/aŭ grekdevenajn. En ĝia vortprovizo troviĝas ĉ. 30% da tiaj internaciismoj, ekzemple: aksiom, dialektik, dialekt, ekonomika, element, ergo, etap, experiment, fakt, forma, fundament, idealist, idealizm, interes, kapitalist, kolektiv, komunist, magazin, material, materialist, orient, perfekt, period, perspektiva, praktika, primitiv, problem, proces, produkt, program, projekt, racional, rezultat, sistem, sintezis, standard, struktura, teknika, teorija, tezis, univerzal, utopija, zona.

La artikolo « Revolucija v istoriji interlingvistiki » ne estas datita, sed ĝia ekesto en la kvindekaj jaroj estas tre probabla, pro tipaj politikaj aludoj. Socialisma Ĉeĥoslovakio tiam staris sub la influo de Sovetunio, kiu havis spertojn kun lingvokonstruado (jazykovoje stroitel'stvo) konekte al normigo kaj alfabetigo de siaj multnombraj etnolingvoj. Tial ekestis, kontraste al “burĝa/kapitalisma” historia esploro de hindeŭropaj lingvoj, la “nova lingva instruteorio” de *Nikolaj Jakovlevič Marr* (1865-1934), kiu aplikis la marksisman filozofion

⁸ “Jiří” estis antaŭnomo de la ĉeĥa poeto Wolker, kiun Podmele ŝatis, „Karen“ estas aludo al „Anna Karenina“

⁹ Occidental en 1949 alinomiĝis al Interlingue, ĉar ĝia bazo, eŭrop-okcidentaj lingvoj, ekhavis negativan konotacion kun kapitalismo, neakceptebla en orienta Eŭropo.

¹⁰ la oficiala organo de Occidental/Interlingue-Union

¹¹ International Auxiliary Language Association, 1924-1951

(dialektikan materialismon) al lingvistiko asertante, ke la lingvo havas klasan karakteron, ke ekzistas lingvoj de ekspluatantoj kaj ekspluatatoj (= de kapitalistoj kaj proletaro). Laŭ Marr, ĉiuj lingvoj estas artefaritaj de la homoj, ili respiegulas klasbatalon de la homa socio kaj tendencas al unu tutmonda lingvo, kiu enhavos elementojn el ĉiuj lingvoj de la mondo. La futura tuthomara lingvo devas esti artefarita kaj ĝi estos „lingvo de nova sistemo, tute speciala, ĝis nun ne ekzistanta“. En 1929 aperis pri tiu teorio skizo “Revolucio en la lingvoscienco” de Andrej Petroviĉ Andrejev, al kiu kvazaŭ estus aludanta la titolo de la koncerna eseo de Podmele (vidu http://eo.wikipedia.org/wiki/Revolucio_en_la_lingvoscienco). Pri lingvistiko interesiĝis kaj skribis ankaŭ la tiama sovetia ŝtatprezidanto Josip Visarionoviĉ Stalin, kiu antaŭvidis la Rusan kiel “zonan lingvon” por orienta Eŭropo. Antaŭ la tutmonda venko de socialismo devintus ekesti unuecaj zonaj lingvoj, kiuj poste kunfandiĝus al unu komuna internacia (vidu Meissner 1977, p. 110).

La lingvoteorio de Marr – marrismo – estis proklamata la plej moderna kaj ĝusta lingvoscienco kaj instruata en universitatoj, kompreneble ankaŭ en Ĉeĥoslovakio en la tempo, kiam Podmele faris siajn studojn en la Karola Universitato en Prago. Kvankam Stalin oficiale distanciĝis de la marrismo jam en la jaro 1950, la nova generacio de lingvistoj – kaj konsekvence ĉiuj, kiuj interesiĝis pri lingvokonstruado – dum iom da tempo ankoraŭ estis sub ĝia influo. Cetere, planlingvoj povis kun marrismo certgrade harmonii, onidire Marr eĉ pretis akcepti Esperanton kiel portempan solvon. Sub tiu aspekto ekestis la teksto de Podmele.

Revolucija v istoriji interlingvistiki

Tezisi napisani v mežduslavjanskim jeziku

Do tego času bila aktivnost za meždunarodni jezik osnovana na principach utopizma, jež ždal si jedinego jezika za ves mir bez vzgleda na fakt, što taki jezik ne može bit v nikakim pripadu rezultatem realnego razvoja jezikov živich, što on bude vsegda tolika *vidumana*, spekulativna *konstrukcija*. Ibo jest realni fakt, što odlišnost jezikov vsegomira jest taka, što nemožno urobit jedinego jezika, jež bil bi vsem ludim srozumitelni, eto znači *realni*. Pozdviženija za meždunarodni jeziki izkustveni (kak volapük, esperanto, ido, novial) ne znala istorickego i naukovogo fundamenta svoji aktivnosti, ich aktivnost ne bila v suglasiju s rezultatami nauk jezikovich i tože ne priimala jezik kak prostredek socialnego karaktera, no toliko kak svobodno ustrojemu *konvenciju*, jež jest možno kak kto to žela izmjenit, pretvorit, što možno material živich jezikov fantasticki otrazit.

Ne, *jezik ne jest svobodna konvencija*, on jest produkt socialnego naživanija mas, naciji. Etot produkt podržen zakonom vznikaniija, razvoja. Straniki izkustvenich meždunarodnich jezikov priimali dalje kak aksiom svoji aktivnosti kritiku živich jezikov. Argumentovali, što živi jeziki

Revolucio en historio de interlingvistiko

Tezoj skribitaj en interslava lingvo

Ĝis nun estis aktiveco por internacia lingvo organizita sur principoj de utopismo, kiu deziris unu lingvon por la tuta mondo sen rigardo al la fakto, ke tia lingvo povas en neniu kazo rezulti el reala evoluo de vivaj lingvoj, ke ĝi estos ĉiam nur *elpensita*, spekulativa *konstruaĵo*. Ĉar reala estas la fakto, ke diferenco de tutmondaj lingvoj estas tia, ke ne eblas fari unu lingvon, kiu estus por ĉiuj homoj komprenebla, tio signifas *reala*. Movadoj por internaciaj artefaritaj lingvoj (kiel Volapük, Esperanto, Ido, Novial) ne konis historian kaj sciencan fundamenton de sia aktiveco, ilia aktiveco ne estis en akordo kun rezultoj de lingvosciencoj kaj ankaŭ ne akceptis lingvon kiel rimedon kun socia karaktero, sed nur kiel libere konstruitan *konvencion*, kiun eblas laŭplaĉe ŝanĝi, transformi, ke eblas la materialon de vivaj lingvoj esprimi fantazie. Ne, *lingvo ne estas libera konvencio*, ĝi estas produkto de socia uzado de amasoj, de nacio. Tiu produkto estas subtenata per leĝo de deveno, de evoluo. Favorantoj de artefaritaj internaciaj lingvoj akceptadis poste kiel aksiomon de sia aktiveco kritikon de vivaj lingvoj. Ili argumentis, ke vivaj lingvoj estas tre

multo da osvojenije, da oni su nelogicki, da proletariatu, narodu, ludu jest potrebnii taki jezik, jez bil bi legki k izučeniju.

malfacilaj por alproprigo, ke ili estas nelogikaj, ke por proletaro, nacio, popolo bezonatas tia lingvo, kiu estus *facile lernebla*.

En sia ĉ. dekpaĝa eseo Podmele klarigas, ke ne eblas tuj krei lingvon akcepteblan por la tuta mondo, ĉar la etnaj lingvoj, servendaj kiel bazo, estas tro diversaj. En la senco de marrismo tamen eblus krei zonajn lingvojn, do ekzemple unu interĝermanan, unu interromanon, unu interslavan ktp., kiuj poste laŭ lingvistikaj leĝoj konverĝos en unu hindeŭropan, kaj se la samo okazos en aliaj lingvofamilioj, rezultos unu tuthomara lingvo. Lia interslava projekto sekve estas praktika kontribuo al tiu ĉi plano. Ege interese estas, ke la hodiaŭaj tendencoj de lingvokreado kvazaŭ konfirmas la teorion de zonaj lingvoj, oni trovas en interreto grupojn: *westasiaconlangs*, *eastasiaconlangs*, *germaniconlangs*, *celticonlangs*, *romanceconlangs*, *slaviconlangs*. La du lastaj grupoj estas aparte fortaj, kun centoj da interesitoj kaj novaj projektoj.

La retrovon de la Podmele-projekto ebligis la digitaligo de materialo kaj disvastigo pere de interreto. Rekonstruon de gramatiko kaj vortkreadaj principoj de Mežduslavjanski jezik faris Jan van Steenberg, unu el la gvidaj personecoj de slaviconlangs, profesia tradukisto, kiu administras la plej gravan interslavan portalon “Constructed Slavic Languages” (http://steen.free.fr/interslavic/constructed_slavic_languages.html). Ĝi enhavas bazajn informojn pri trideko de la plej konataj panslavaj lingvoprojektoj el antaŭinterreta erao, kelkaj kun ligoj al koncernaj materialoj elektronike legeblaj ĉe Google (e-books): Ruski jezik (Križanić 1661), Svaslavjanski jezik (Ban 1850), Universalis Lingua Slavica (Herkele 1825), Vseslavenščina (Raić 1853), Vsjeslovianьskyy (Bambas 1861), Uzajemni pravopis slavjanski (Majar-Zijlski 1965), Basic Slovak (Mistrík 1981). Aldoniĝas 34 novaj projektoj, kreitaj ekde 1999, ĉiuj kun ligoj al materialoj, plej ofte originalaj paĝoj de la aŭtoroj kaj/aŭ propraj retpaĝoj de tiuj projektoj.

Slaviconlangs estas krude divideblaj en du grandajn grupojn:

- 1) “Ekzotikaj”, kiuj estas uzataj en fikciaj mondoj (ekzemple “Constructed Universe III Bethisad” aŭ reprezentas iun hipotezan slavan komunumon, ekzemple “nordslavaj lingvoj”¹² kiel Našica (Jan Havliš), Sevorian (James Campbell), Skuodian (Pavel Iosad), Slavěni, Seversk, Slavisk, Lydnevi, Mrezian (ĉiuj de Libor Sztemon) kaj Onegian (Pawel Ciupak).
- 2) Panslavaj helplingvoj, kiuj estas ofte propagataj de propraj organizaĵoj kaj komunumoj. Ili havas sian forumon ĉe Yahoo (<http://tech.groups.yahoo.com/group/slaviconlang/>), blogaron (<http://www.blognik.com>), novajagentejon (<http://www.zvestia.com>) kaj proprajn konstruformumojn.

Unu el la klasikaj estas *Slovio*. kreita ĉ. 1999 de slovakdevena kanada lingvisto Mark Hučko, kaj ekde 2001 disvastigata ineterrete (www.slovio.com). Ĝi estas tre populara kaj troviĝas en 26 vikipedioj. En <http://eo.wikipedia.org/wiki/Slovio> legiĝas la jeno: “Slovio estas internacia helplingvo kreita por helpi slavajn parolantojn interparoli, tamen la propagando de Slovio legebla en la TT-ejo prezentas ĝin kiel lingvon kiu superas Esperanton ĉar ĝi estus tuj komprenebla de ĉiuj eŭropanoj, kiuj parolas iun de la slavaj lingvoj. La gramatiko de Slovio estas simila al Esperanto, sed la vortaro devenas el la plej konataj slavaj vortoj. Laŭ Hučko, Slovio estas komprenebla de pli ol 400 milionoj da homoj tra la mondo. La nomo, Slovio, devenas de la pra-slava vorto *slovo*, kiu signifas *vorto-n*.”

Sur la bunta kaj riĉa interreta paĝo www.slovio.com troviĝas i.a. lingvokurso en dek lecionoj kaj klarigo, ke Slovio estas sukcesa interslava lingvo, transpreninta la praslavan tradicion. Aldoniĝas ligoj al diversaj slavaj forumoj, filmetoj, bildoj kaj leteroj de

¹² Nordslavaj lingvoj reale neekzistas, la oficiala divido estas: orientaj, okcidentaj kaj sudaj slavaj lingvoj

lingvouzantoj, ĉefe anglalingvanoj, kiuj asertas, ke Slovio multe helpas al ili inter slavoj, kiuj ne sufiĉe scipovas la Anglan. Diversaj varbiloj promesas eĉ eblojn gajni monon per Slovio.

Slovio povas uzi alfabeton latinan aŭ cirilan: La latina alfabeto estas: a b c cx d e f g gx h i j k l m n o p r s sx t u v wx z zx . La sono kaj la prononco de la literoj estas simila al Esperanto skribata per la x-sistemo. Inter la dusignoj estas du malsimiloj kompare kun Esperanto: wx - prononciĝas kiel ŝĉ, zx - prononciĝas kiel ĵ. La cirila alfabeto: а б в г д е ё ж з и й к л м н о п р с т у ф х ц ч ш щ ъ ь э ю я (prononcataj same kiel en la rusa). Я-sistemo: sonoj ja, ju, jo estas skribataj per literoj я, ю, ё. ЪА-sistemo: sonoj ja, ju, jo estas skribataj per literoj ъа, ъю, ъо.

En la morfologio surprizas unue, ke la tradicia slava deklinacio malaperis kaj ekzistas nek gramatika genro. La nominativo povas esti markita per finaĵo *-a*. La finaĵo *-uf/-if* indikas aŭ genitivon, aŭ objektan akuzativon, tie, kie ĝi ne estas klara el la vortordo. Alternativa finaĵo estas *-um*. Plurala finaĵo estas *-s*. Adjektivoj havas finaĵon *-ju* (velju, prostju), komparo krome sinteza (veljusx, najvelju) ankaŭ analiza (bolsx velju, maks velju). Objekto-kaza finaĵo *-f* aperas ankaŭ ĉe pronomoj : kto? = kiu? ktof? = kiun? Oni = ili, onif = ilin. Poseda pronomo havas finaĵon *-i*: moi, tvoi, jegoi, onoi, sed ne en la unua kaj dua p. de pluralo (nasx, vasx). Verbojn eblas konjugacii tradicie per finaĵoj, sed ankaŭ analize pere de neŝanĝebla helpverbo „es“, kaj infinitivo, ekz: ja es idit, ti es idit, on es idit ... (laŭvorte: mi estas iri, vi estas iri, li estas iri ...) do same kiel en Esperanto, la personaj pronomoj gravas por rekoni la personon. Pasinteco tiel kreiĝas per „bil“ (ja bil idit, ti bil idit), futuro per „bu“ (ja bu idit, ti bu idit ...). Tiu ĉi sistemo estas rapide transprenebla por ĉiuj novaj, eĉ neslavaj verboj (ja es extrapolate, ja bu extrapolate...). Participo enhavas markilon de tempo (*-t* pro prezenco, *-l* por pasinteco, *-b* por futuro). Adverbaj participoj havas finaĵon *-uo*.

Ankaŭ ĉe kreado vortprovizo la aŭtoro parte inspiriĝas ĉe Esperanto, ĝeneraligante la eblon de afiksa derivado. Ekzemple „materialo“ esprimiĝas, simile al *-aĵo*, per sufikso *-ivo*: svin – svinivo (porko-porkaĵo), drev – drevivo (arbo – ligno), toplit – toplivo (hejti – hejtaĵo), palit – palivo (bruli – brulaĵo). Por landoindikoj uziĝas sufikso *-zem* (zem = lando): Ruzzem, Bulgarzem. Ankaŭ kunmetado estas uzata por pliriĉigi la vortprovizon: slovknig (vortolibro), nogmiacx (piedopilko), glavngrod (ĉefurbo) ktp.

Teksto: *Slovio es novju mezxunardju jazika ktor razumijut cxtirsto milion ludis na celoju zemla. Slovio mozxete upotrebit dla gvorenie so milions slavju. Slovio imajt prostju, logikju gramatia i es idealju jazika dla dnesju ludis. Ucxijte Slovio tper. Slovio imajt uzx okol 60 tisicx slovis, imenis i virazxenies. To es plus slovis cxem u neskolx "prirodju" jazikas. Ucxijte universalju slaviansk jazika tper! Iskame jazikaju nauknikis i perevoditelis ktor hotijut sotrudit s nams v tut ogromju proekt.* (Slovio estas nova internacia lingvo, kiun komprenas kvarcent milionoj da homoj en la tuta mondo. Slovion vi povas uzi por parolado kun milionoj da slavoj. Slovio havas simplan, logikan gramatikon kaj estas ideala lingvo por hodiaŭaj homoj. Lernu Slovion nun. Slovio havas jam ĉirkaŭ 60 mil vortojn, nomojn kaj esprimojn. Tio estas pli da vortoj ol en iuj “naturaj” lingvoj. Lernu la universalan slavan lingvon tuj! Ni serĉas lingvajn sciencistojn kaj tradukistojn, kiuj volas kunlabori kun ni en tiu grandega projekto.)

Kelkaj pli novaj slaviconlangs estas imitaĵoj aŭ reformoj de Slovio, aŭ venas al similaj rezultoj, kvankam plej multaj preferas konservi tradician slavan deklinacion kaj ĉefe konjugacion kun la tempaj aspektoj. Sur la menciita paĝo de Jan van Steenberg en oni povas konatiĝi i. a. kun projektoj Glagolica (Slavoboj Ruibar 2002), Proslava (Juraj Doudi 2002), Mezduslavske (Lorenzo Manasci 2003), Sojaz (Hellerick 2005) Slovianski (Ondrej Reĉnik, Gabriel Svoboda 2006), Sloviansk (Ioannes 2008), Slovioski (Steven Radzikowski k.a. 2009), Slavski jezik (Jukka Hintsala 2009), Rusich (Nikolaj Mihajlenko 2010), krome enestas kelkaj conlangs de van Steenberg mem, inter ili la plej sukcesa, „tipe“ slav(eca) Slovjanski, kiu estas evoluigata sur la koncerna forumo. Ĉe ĝi siavice inspiriĝis ĉefoj Vojtěch Merunka kaj Zdeněk Linhart, kiuj kreis kun helpo de van Steenberg sian „Jazyk novoslovienskij“ kaj

en la jaro 2010 sukcesis ricevi financon subtenon de EU (Erasmus-Grundtvig) por ĝia instruado en Ĉeĥio.

Sume, slaviconlangas estas populara lingvogrupo ĉefe pro tio, ke multaj slavoj havas konscion pri sia komuneco kaj panslavismo, iam grava kultura kaj politika movado, kiun kelkaj volas revivigi. Por la slaviconlangas validas la samo kiel por romanceconlangas: ĉar ili havas komunajn fontojn, ili estas reciproke kompreneblaj kaj aspektas kiel dialektoj de la sama (hipoteza) ĉeflingvo.

4.1.3. Aliaj ekzemploj de auxlangas

Glosa

(<http://www.glosa.org>) estas organizo subtenata samnoman helplingvon. Apud Esperanto kaj Interlingua, Glosa ofte estas prezentata sur internaciaj konferencoj kiel serioza kandidato por oficiala internacia lingvo. Sub la nomo „Interglossa“ ĝin lanĉis jam en la jaro 1943 Lancelot Hogben. Ronald Clark kaj Wendy Ashby plievoluigis ĝin en la jaroj 1972-1992. Post la morto de Clark en junio 2000, Ashby sola gvidas la organizaĵon.

La vortara bazo de Glosa estas la greka kaj latina lingvoj, sed la gramatiko estas izoliga en tiu senco, ke la vortoj ĉiam restas en sia originala konekta formo kaj ne ricevas fleksiajn finaĵojn. Gramatikajn funkciojn transprenas rigida sintakso kaj la vortetoj nomataj operatoroj. Tiu aspekto similigas Glosa-n al aziaj kaj kreolaj lingvoj. Unuopaj vortoj reprezentas nociojn, sed ne vortklasojn, do similie kiel en la Angla, la sama vorto povas funkciigi kiel substantivo, verbo, adjektivo aŭ prepozicio. Ekzistas du variantoj de Glosa: la baza kun mil radikoj (Glosa 1000 aŭ Centra Glosa), kiu sufiĉas en kutimaj ĉiutagaj situacioj, kaj la plilarĝigita Glosa 6000 (Mega Glosa). La prononco similas al la Itala kaj Germana, ĝi estas regula. La skribo estas latina, sen supersignoj kaj duoblaj literoj.

Ekzistas, precipe en la reto, lernolibroj kaj enkondukoj en la Angla, Germana, Portugala, Franca, Hispana, Rusa, Nederlanda kaj Hungara, ampleksaj vortaroj Glosa-Angla kaj Angla-Glosa, komputila programo por aŭtomata traduko, informoj pri historio en pluraj lingvoj, kolekto da tekstoj kaj tradukoj el la angla kaj franca prozo, tradukoj el biblio, el bahaaj tekstoj kaj el Bhagavadgita, specimenoj da sontekstoj, oficiala ĵurnalo „Plu Glosa Nota“ kaj ties arĥivo, kaj revuo „Justi“ aperanta en Esperanto kaj Glosa, el kiu estas tranprenita la sekva specimeno (<http://www.glosa.org/gl/justi.htm#nume62>):

Preskau antau kvincent jaroj, la kristana eklezio koruptighis per multaj falsaj doktrinoj. Homo nomita Martin Luther redukis homojn al la doktrinoj de la Sankta Biblio. Lia laboro kaj la laboro de liaj amikoj nomighas la Reformacio. Per Luther Dio reestablis al la eklezio la purecon de doktrino kaj novan vivon de fido pri Kristo.

La doktrinoj de la lutera eklezio estas ne novaj. Ili estas la instruajhoj de la Biblio. Do la lutera eklezio ne estas nova eklezio.

Ghi ne estas sekto au kulto.

Ghi estas eklezio, kies doktrino bazighas sur la vortoj skribitaj per la profetoj de la Malnova Testamento kaj per la apostoloj de la Nova Testamento. La Biblio diras al ni pri Jesuo Kristo.

La doktrinoj de la lutera eklezio estas tiuj de la originala antikva eklezio de la apostoloj kaj la fruaj kristanoj.

Proxi pre 500 anua, Kristo eklesia pa gene ero per poli falsi doci. Un homi, ge-nomina Luther, pa duce plu homi versi doci ex Kristo-Bibli. An ergo kon ergo de an ami gene nomina "Reforma" ["re-forma"]. Per Luther, Teo pa moti eklesia versi puri religio doci e versi neo bio de fide de Kristo.

Panto religio doci de Lutera eklesia ne es neo. Mu es doci ex Kristo-Bibli. Kaco u Lutera eklesia ne es u neo eklesia.

Id ne es u falsi alo sekreti religio.

Id es un eklesia; qi doci habe baso epi verba, ge-grafo ex Paleo-Akorda pre-vid-pe e ex Neo-Akorda ge-mite-pe. U Kristo-Bibli dice a na de Jesu Kristo.

Panto doci ex Lutera eklesia es doci ex origi paleo eklesia de panto ge-mite-pe e de pre-kron Kristo-pe.

Earth Language

estas verko de Yoshiko McFarland, kiu venis al Usono el la japana Osaka. Hazarde, ŝia naskiĝtago estas la t.n. Pearl Harbor Day, dum kiu la usonanoj rememorigas la militon kun Japanio. Tio ŝokis ŝin kaj ŝi ekpensis pri rimedo por interpacigi kaj interkomprenigi la popolojn en la tuta mondo, la „*Earth Language*“ (tera lingvo), <http://earthlanguage.org/>: "*We need to prepare rational tools instead of emotional weapons for keeping peace. We need to prepare a common background to feel that everybody on the earth is part of a single family*". En sia infanaĵo, Yoshiko estis malriĉa kaj ne havis ludilojn, tial ŝi mem produktis ilin el diversaj branĉetoj, ĉifonetoj kaj aliaj trovitaj materialoj. Tio ekplaĉis al ŝi, do ŝi studis desegnon kaj arton en Kjoto kaj startis projekton uzi tutmonde kunlabore la recikleblajn materialojn. Ankaŭ pri ideoj kaj lingvoj ŝi havis similan proponon, nome uzi ĉion, kion la unuopaj popoloj tra la mondo povas oferti. Dum tio ŝi substrekis la valoron de la popolaj tradicioj, vidante, ke precipe en Japanio tiuj malaperas, ĉar oni transprenas usonan kaj eŭropan kulturon. Tial ŝi ellernis tradician batikon de Izumo kaj vivstilon de Tao kaj kolektis mitologiajn rakontojn kaj legendojn de sia popolo. Ŝi produktis artaĵojn por temploj, muzeoj, hoteloj kaj oficejoj kaj skribis artikolojn kaj librojn pri tradicia arto. 1985, post ŝia unua vizito de Usono, ŝi konatiĝis kun ritoj kaj sanigaj praktikoj de Indianoj kaj konsciiĝis, ke la radikoj de la „paganaj“ kulturoj estas similaj.

Ekloĝinte poste en Usono, ŝi konsciiĝis, ke la civilizo alportis multajn kutimojn, kiuj diferencigas la popolojn. Tio koncernis ankaŭ lingvojn: ŝi, nekonante la parolatan ĉinan, povis kompreni la 1500 jarojn malnovan ĉinan manuskripton en la muzeo pli bone ol la anglan tradukon. Tio estis baza teknika ideo de „*Earth Language*“: uzi la signojn kompeneblajn al ĉiuj popoloj. En 1988 ŝi publikigis la projekton kun 1600 vortradikoj en la formo de simboloj bazaj kaj gramatikaj. Temas pri kombino de skribo Kanĝi kun matematikaj simboloj. „*Earth Language*“ estus la dua lingvo por la mondo: ĉiu konservus kaj protektus sian propran lingvon kaj kulturon kaj helpe de „*Earth Language*“ konigus ŝin al malsamlingvanoj kaj malsamkulturanoj. La lingvo estis prezentita dum diversaj kulturaj aranĝoj tra la mondo, en la usona televido kaj en 2005 aperis unuaj libroj pri ĝi en Japanio.

4.2. Engelangs – eksperimentaj lingvoj

Toki pona (bona lingvo, Tokipono)

estas projekto de esperantistino Sonja Ellen Kisa, lingvistino vivanta en Kanado. Ŝia interreta „*LiveJournal*” estas ofte vizitata ne nur de esperantistoj. Ŝia paĝo www.kisa.ca ekzistas ankaŭ en Esperanto. Toki Pona ekzistas ekde 2001 kaj havas propran retpaĝon www.tokipona.org. Ĝi estas « minimumeca » lingvo, do iuspeca artefarita pidĝino, kiu tute konscie enhavas nur la plej bazajn kaj ĝeneralajn elementojn, bezonatajn por komunikado. La celo de la aŭtorino estis krei per eble plej malmultaj rimedoj la plej eble multajn sencohavajn esprimojn. Toki Pona ne celas esti helplingvo, estus do eraro meti ĝin en tiun kategorion. Ĝia inspirofonto estas la taoisma filozofio, celanta orientigi la mensoprocezojn de la lingvouzanto al la plej ebla simpleco. Tiel povas – cetere en konsento kun la Sapir-Whorf-teorio – la lingvo influu la pensmanieron de siaj uzantoj. Ĝi ne bezonas pli ol 120 vortojn. La vortaro e havas, krom angla, germana kaj franca bazo, elementojn el Esperanto, Tok Pisin, la Finna, la Georgia, la Kroata kaj la Ĉina (kaj Mandarina kaj Kantona).

Toki Pona ekestis originale kiel persona lingvo de la aŭtorino, poste lernis ĝin familianoj, geamikoj kaj fine vizitantoj de la interreta retpaĝo kaj esperantistoj. Nun ĝi estas aktive parolata lingvo, ĝia lingvokomunumo havas centon da membroj, la plej spertaj parolantoj skribas en ĝi ankaŭ siajn proprajn retpaĝojn (Pije <http://www.toki.dm7.net>, Damian <http://www.pineight.com/tokipona/tpreview.html>, Kowi <http://www.tokipona.bravehost.com/> kaj aliaj). Ekzistas ankaŭ diskutpaĝoj pri Toki Pona en la Angla kaj en Esperanto, la lingvokursoj estas ofertataj en kadre de precipe junularaj renkontiĝoj (vidu Blahuš 2011). La

literaturo de Tokipono aktuale konsistas el proverboj, partoj de religiaj tekstoj, poemoj kaj kelkaj noveloj.

Krom kelkaj interretaj kursoj, ankaŭ Esperanto-vikipedio detale priskribas la lingvon (http://eo.wikipedia.org/wiki/Toki_pona). La originala skribsistemo estas la latina alfabeto, sed la toki-ponanoj proponis krome Tengwar, korean Hangul, logogramojn el Unikodo, silaban skribon ktp.. La latina alfabeto uzas nur 14 literojn: kvin vokalojn (a, e, i, o, u) kaj naŭ konsonantojn (j, k, l, m, n, p, s, t, w), simile kiel en la Havaja. Ili estas ĉiuj prononcataj laŭ la internacia fonetika alfabeto, tolerataj estas nur alofonoj (ekz. *b, d, g* anstataŭ *p, t, k*, aŭ *z* anstataŭ *s*), se la laŭnorma prononco estus por kelkaj parolantoj malfacila aŭ malkutima. Tial, ekzemple, mankas *r*, kiun oni povus konfuzigi kun simila lateralo *l*. La silabostrukturo estas C-V-N (konsonanto – vokalo – nazalo), la plej ofta silabostrukturo estas CV (75%), nur en la unua silabo de la vorto povas manki la komenca konsonanto. La silabosistemo similas al tiu de la Japana:

a	e	i	o	u	La silabo 'u' povas esti ronda aŭ neronda.
ka	ke	ki	ko	ku	Plozivoj kaj frikativoj
sa	se	si	so	su	povas esti voĉaj aŭ nevoĉaj.
ta	te		to	tu	La silabon 'ti' oni evitas pro similo al 'si'
na	ne	ni	no	nu	
pa	pe	pi	po	pu	
ma	me	mi	mo	mu	
ja	je		jo	ju	La silabon 'ji' oni evitas pro similo al 'i'
la	le	li	lo	lu	
wa	we	wi			La silabojn 'wu' kaj 'wo' oni evitas pro similo al 'u' kaj 'o'. ĉe fino de silabo

La plej multaj vortoj estas dusilabaj, simile kiel en polineziaj lingvoj, la akcento estas sur la unua silabo. Kun granda komenca litero estas skribataj nur propraj nomoj.

La vortprovizo estas malgranda, tial ĉiu vorto havas kelkajn (parencajn) signifojn kaj la kunteksto estas tre grava. Krome estas uzataj kunmetaĵoj el kelkaj bazaj vortoj por priskribi la deziratan aĵon, do ekzemple “pona” (bona) kaj “pana” (doni) kunmetiĝas en “pana e pona” (danki). La vortoj mem ne subiras ŝanĝojn, ne ekzistas finaĵoj, sekve devas la bezonataj “gramatikaĵoj” esprimiĝi per apartaj modifantaj vortoj. Ne ekzistas genro, kazo aŭ numero (kiel kutime en izoligaj lingvoj), nek konjugacio kaj deklinacio. Ĉar vortoj en si mem ne havas karakteron de substantivo, verbo aŭ simile, gravas la kunteksto kaj la preciza lokigo de la vorto en la frazo. Ekzemple, “li” estas partikleca vorto, kuŝanta meze inter la subjekto kaj la verbo: “jan li pona” (homo[j] estas bona[j]). Ĉe propraj nomoj staras ĝenerala vorto kiel karakterizaĵo, ekz. “jan Sonja” ([homo] Sonja). Ĉiu vorto havas multajn denotaciojn. Tiel do signifas la vorto „suli“ ne nur „granda“ aŭ „longa“, sed ankaŭ „grava“. La vorta aŭ frazmembra pozicio estas per tio ofte decidiga por la korekta signifo de certa vorto. Ekvivalento por la vorto „esti“ entute mankas, kaj per tio ankaŭ ĉiuj tempoformoj. Unu frazo povas do priskribi la nuntempon, estintecon aŭ futuron, ekz. “mi sulis” signifas mi estas (-os, -is, -us...) granda/grava.

Per kombino de pluraj vortoj kromaj esprimoj fariĝas superflujaj. Tiel oni esprimas la esprimon „viktimo“, per tio ke oni kombinas la vortojn „jan“ („homo“) kaj „pakala“ („lezita“) al „jan pakala“. La nombro de vortokombinoj estas tiel nature senlima.

Ekzistas vortoj por kvin bazaj koloroj: walo (blanka), pimeja (nigra), loje (ruĝa), laso (blua), jelo (flava), ĉiuj aliaj kreiĝas per ilia kombino, ekz. laso jelo (verda).

Toki Pona havas nur kvin bazajn numeralojn, kiuj ĉiam staras post la koncerna substantivo: *ala* "nul, ne-", *wan* "unu", *tu* "du", *mute* "kelkaj, multaj", *ale* "ĉio, ĉiuj". Por esprimiĝi pli detale oni uzas pliajn vortojn, kiel ekz. *luka* "mano", kiel numeralon "kvin". Krome oni povas uzi kunmetitajn sintagmojn: *tu tu* "kvar", *luka wan* "ses", *luka tu* "sep", *luka luka* "dek", *luka luka wan* "dek unu". Krome en ĉi tiu skemo *mute* signifas 20 kaj *ale* 100.

Ekz. *mute mute luka* "45", *ale ale wan* "201". Por formi ordajn numeralojn estas uzata la vorto *nanpa: jan pi nanpa wan* "unua persono".

Simple frazo konsistas el subjekto kaj verbo aŭ adjektivo, do ekzemple „mi awen.“ = „Mi atendas.“, sed ankaŭ „Ni atendas.“ Por ke tamen ankaŭ pli komplikaj kaj kompleksaj frazoj estu kompreneblaj por la aŭskultanto aŭ leganto, kvar „helpovortoj“ estas enplektataj en la frazojn. Per tio eblas distingi subjektojn, objektojn, malsamajn verbojn aŭ ankaŭ adjektivojn kaj adverbojn unu de la alia: *Pluraj rektaj objektoj*: „mi moku e kili e telo.“ = „Mi konsumas akvon kaj fruktojn.“ La „e“ ĉi tie montras, ke „kili“ kaj „telo“ ambaŭ estas rektaj objektoj kaj apartenas al la verbo „moku“. *Pluraj verboj*: „waso li lukin li moku.“ = „La birdo rigardas kaj manĝas.“ La „li“ faras ĉe tio klare, ke la du verboj „lukin“ kaj „moku“ rilatas al la sama subjekto „waso“. *Kombino de substantivoj kaj adjektivoj*: „jan pi pona lukin.“ = „Bone aspektanta homo.“ Sen la „pi“ la frazo signifus „rigardanta amiko.“, ĉar „jan pona“ signifas „amiko“ kaj „lukin“ ja sekvas kiel adjektivo. *Adverba konteksto*: „tenpo ni la mi lape“ „Nun mi dormas“. Je la fino de la adverba konteksto devas stari la partiklo „la“. Krome la tuto staras antaŭ la subjekto de la frazo. Kune kun la vorto „ken“ ĝi havas la signifon „eble“, ekz. „ken la jan Lisa li moku e suwi.“ = „Eble Lisa manĝis la dolĉaĵon.“ Antaŭ la partiklo „la“ ankaŭ povas stari tuta frazo. Tiam ĝi havas la signifon „se“, ekz. „mi lape la ali li pona.“ = „Se mi dormas, (tiam) ĉio estas bona.“ (Indikoj el http://eo.wikipedia.org/wiki/Toki_pona).

Toki Pona mem iĝis fonto por minimume du aliaj lingvoprojektoj: kaŝlingvo *Ta Ti* de Marc Thompson kaj *Toki IO*, minimumna lingva kodo kun 110 vortoj, uzanta binaran ciferan sistemon. Jen specimeno de la Toki Pona-frazaro:

a a a! ni li musi. :: Hahaha! Tio estas gaja.
ijo ike li lon monsi mi. :: Malbonaj aĵoj estas malantaŭ mi.
ijo li lukin e mi. :: Io rigardas min.
jan ike li utala e ona mute. :: Malamiko atakas ilin.
jan li pona. :: Homo(j) estas bona(j).
jan mute li kama. :: Multaj homoj venas.
kasi kule li pona lukin. :: Floroj estas belaj.
ken la ona li lon tomo sona. :: Eble li estas en lernejo.
kule seme li pona tawa sina? :: Kiun koloron vi ŝatas?
lon :: jes
lon ala :: ne
mi kama tan ma Elopa. :: Mi venas el Eŭropo.
mi ken ala kute e toki sina. :: Mi ne aŭdas vin paroli.
mi lon. :: jes, mi faras.
mi pona tan ni: mi lon. :: Mi estas en ordo, ĉar mi vivas.
mi tawa! :: Ĝis!
mi wile tawa ma Oselija. :: Mi volas iri al Australio.
mute seme? :: Kiom?
ni :: Tiu ĉi
ni li musi ala musi? musi. :: Ĝu tio estas gaja? Jes, estas.
o tawa! :: Foriru!
pona :: Dankon!
sina sona ala sona e toki Inli? :: Ĉu vi parolas angle?
tenpo suno kama la mi wile pali. :: Morgaŭ mi devas labori.
toki pona li pona tawa mi. :: Mi ŝatas Toki Pona-n.

Láadan

estas verko de Suzette Haden Elgin. Ŝi studis lingvojn en Kalifornia Universitato en San Diego, skribis siajn disertaĵojn en la Angla kaj en Navajo, instruis lingvistikon en la Ŝtata Universitato en San Diego kaj ekde 1980 vivas en Ozarks en Arkansaso. Ŝi fondis organizaĵon por aŭtoroj de sciencfikcia poezio, eldonante du bultenojn pri lingvistiko kaj sciencfikcio. Scienc-fikian literaturon ŝi komencis skribi 1970, iĝis konata 1981 per “The Ozark Trilogy” kaj precipe per serio “Native Tongue” (t. e. denaska lingvo), scienca eksperimento kun dekjara daŭro, kiu inkludis inventon kaj elprovon de porvirina lingvo Láadan. Tiu ĉi devus speciale esprimi sentojn kaj bezonojn de virinoj kaj iliajn tipajn psikajn trajtojn. Ĝi devus

ankaŭ subteni hipotezon, ke lingvo firme konektiĝas kun kulturo, kaj ke ĝi influas socion. La celo de la eksperimento estis elprovi la lingvon ĉe virinoj kaj observi iliajn reagojn. En etnaj lingvoj (ĉefe en la Angla) mankas detalaj esprimoj por tipe virinaj korpaj sentoj kaj emocioj. La eksperimento ne estis komplete sukcesa, Láadan tamen eskapis el la literatura verko, iĝis konata precipe en interreto, aperis ĝiaj gramatiko, vortaro, tekstoj, eseoj, diskutpaĝoj, societoj k.s. Jen kelkaj tipaj esprimoj kun anglaj tradukoj el ŝia interreta paĝo <http://www.sfwa.org/members/elgin/NativeTongue>:

VORTO	DIFINO
ashon	love for one who is not related by blood but is heart-kin
azháadin	to menopause uneventfully
dólorado	to dominate with evil intent
doólelasholan	alone at last, after putting up with tiresome people
elasháana	to menstruate for the first time
héena	sibling of the heart
lalal	mother's milk
lewidan	to be pregnant for the first time
loláad	to perceive internally, to feel
lirini	an achievement that seems small to other, but means a lot to the achiever
móna	compassion for foolish reasons
múna	compassion for bad reasons
nehena	contentment despite negative circumstances
nuna	contentment for bad reasons
ohehena	respect despite negative circumstances
óothanúthul	spiritual orphanhood; being utterly bereft of a spiritual community
radama	to non-touch; to actively refrain from touching
radamalh	to non-touch with evil intent
radena	unfriendliness for good reasons
radona	unfriendliness for foolish reasons
sham	love for the child of one's body
thehena	joy despite negative circumstances
wesháana	to menstruate late
widazhad	to be pregnant late in term and eager for the end
wonewith	to be socially dyslexic; uncomprehending of the social signals of others
zhaláad	the act of relinquishing a cherished/comforting familiar illusion

4.3. Artlangs

Por lingvohobiaj aŭtoroj, ofte posedantaj lingvistikan erudicion, gravas lingvokreemo, kies rezulto estas „kompleta“, uzebla lingvo. Plej ofte ĝi estas konstruita ne por interhoma uzado, sed dekomence celita kiel lingvo de fikcia popolo. En tiu kazo, la lingvo mem estas elemento malpli grava, bezonata por finkarakterizi la inventitan mondon, al kies priskribo kaj funkciado la koncerna aŭtoro kutime dediĉas eĉ pli da energio kaj zorgemo ol al la lingvo mem. La kvalito de tiutipaj kreitaĵoj do estas ne nur lingvistika, sed ankaŭ arta, estetika kaj literatura.

Dum relative nelonga ekzisto de interreto ne nur ekestis dekoj da specialaj portaloj por artlangs (Geofiction Club, Elfling, Ideolengua, Zompist, Uchronia, Kalusa, World-Building, Sampa, Aleppo, Artificial Language Forum, Invisible Lighthouse, Conculture List, k.a.), sed evoluiĝis detala terminologio, publikigita interalie en vikipedio (<http://en.wikipedia.org/wiki/conlangs>). Artlangs (Artistic Languages), pludividiĝas jene:

Artlangs:	Artaj planlingvoj:
Fictional	Fikciaj
Alternative	Alternativaj
Micronational	Mikronaciaj

Personal
Jokelangs
Language Games

Personaj
Ŝercaj
Lingvaj ludoj

4. 3. 1. Ekzemploj de artlangs de unuopaj personoj

David Bell

Ekz. http://www.graywizard.net/Conlinguistics/amman_iar/amman_iar.htm estas la retpaĝo de usona matematikisto kaj komputikisto David Bell, kiu klarigas, ke li dum pluraj jaroj laboras pri sia fikcia lando *Ámman* kun ties du ĉefaj lingvoj. Unue ekestis la mapo de *Ámman* kun riveroj, arbaroj kaj montoj, sed sen nomoj, ĉar tiuj devis ricevi nomojn en posta lingvo. Poste en *Ámman* ekloĝis kvar grupoj de homoj. Aeárhost loĝis sur la bordo en nordokcidento kaj estis maristoj. Áldrost vivis en la arbaroj. Nárdhost vivis en granda ebenaĵo en sudoriento kaj Órdhost en la montaro. La kvina grupo Rándhin estis nomadoj, vivantaj en la suda dezerto. Ilia lingvo restis plej proksime al la pralingvo Vulányal. La aŭtoro unue planis ellabori el la pralingvo kvin memstarajn lingvojn, kiuj konformus al vivmaniero de la kvin popoloj. Poste li konstruis nur unu lingvon, tiun de Nárdhost-popolo, kiu disvastiĝis tra la tuta okcidento kaj servas kiel internacia, same kiel la Angla en nia mondo. Iam en mezepoko atingis la bordon de *Ámman* maristoj el Dunedain, kaj ilia lingvo influis la lokan normlingvon *Áman iar*. La dua, ankoraŭ ne komplete ellaborita ĉefa lingvo nomiĝas Forendar.

Ámman iar (ammana lingvo) estas relative simpla, aglutina kaj konsistas el komputile generitaj vortoj. Ĝi havas substantivojn, adjektivojn, pronomojn, verbojn, adverbojn, partiklojn, interjekciojn kaj kvalitulojn (qualifiers). La substantivoj havas naŭ kazojn. Verboj havas du tempojn (pasinta kaj nepasinta) kaj estas transitivaj aŭ netransitivaj. Ili havas du konjugaciojn. La sintakso estas simpla (subjekto-verbo-objekto). Ankoraŭ ne ekzistas komplete teksto, sed jes ja detala vortaro *Ámman iar*-Angla. Jen parto de ĝi:

adar <ADAR> [n] (pl edair) (1) parent; (2) patron, protector, guardian; (3) an owl, considered to be a bird of good omen; adradel <ADAR-del> [n] (pl edraidel) uncle/aunt (epicene); adradelan <ADAR-del-an> [n] (pl adredilan) maternal uncle; adradelîel <ADAR-del-îel> [n] (pl adradilil) paternal aunt, more commonly amilil (see under AMIL); adran <ADAR-an> [n] (pl edrain) father; adrannis <ADAR-an-is> [n] (pl adrennis) paternal uncle if younger than father; adrannon <ADAR-an-ron> [n] (pl adrennöin) paternal uncle if older than father; adrar <ADAR-ar> [n] (1) parenthood; (2) the characteristics, condition of a parent; adrellis <ADAR-îel-is> [n] (pl adrillil) maternal aunt if younger than mother; adrellon <ADAR-îel-ron> [n] (pl adrillöin) maternal aunt if older than mother; adrîel <ADAR-îel> [n] (pl edril) mother, more commonly amil ...

Sally Caves

En la reto troveblas multaj similaj paĝoj kun fikciaj landoj, planedoj kaj societoj, en diversa stato de ellaboro. Kelkaj enhavas detalan priskribon de fikciaj landoj kaj iliaj loĝantoj kun ĉiuj detaloj, aliaj nur bazajn informojn pri la uzantoj, sed detale ellaboritan lingvon, kiel ekzemple la paĝo <http://www.frontiernet.net/~scaves/teonaht.html> de Sally Caves, profesoro pri la Angla en novjorka ŝtata universitato kaj funkciulino de LCS. Lerninte plurajn lingvojn kaj malkovrinte interretajn paĝojn pri fikciaj lingvoj, ŝi lanĉis la lingvon *Teonaht*. Ĝi estas lingvo de Teonoj el la lando Teonea (Teon + hea, "lando"), kiu de tempo al tempo elmergiĝas el la maro, plej ofte Nigra aŭ Kaspia. La Teonoj eble devenas el Kaŭkazo. Etimologoj supozas, ke la nomo "Teon" devenas de verbo "fuĝi", ĉar ili fuĝas kaj misfidas ceterajn homojn. Ili estas "iom aliaj" ol ni, havante po dekdu man- kaj piedfingroj. Tial ilia numeralo sistemo baziĝas sur 24. La Teonoj povas ŝanĝi sian okulkoloron. Sur la pentraĵo de s-ino Caves ili estas en tradicia kostumo el la 17-a jarcento. Ilia preferata simbol-besto estas rampanta kato.

Teonaht ehavas multajn dialektajojn, sed ekzistas standarta formo, uzata en tagaj ĵurnaloj, kiu estas sur la koncerna paĝo detale prezentita. Grave: la lingvo ne estas statika, t. e.

ĝi daŭre evoluiĝas. Principe ĝi havas indoeŭropan ĥarakteron, sed ĝi posedas OSV (objekto-subjekto-verbo) vortordon, kiu estas ekstreme rara. Ĉiukaze, la verbo staras je la fino de la frazo. Ekzistas difina kaj nedifina artikolo, ĝi antaŭeniras la substantivon: blar lihohza; ilhhohza ryttepron. "loud the wind; the wind I feel." Substantivoj havas du specojn de nominativo: "agent" (A) kaj "experiencer," (E). La unua staras ĉefe ĉe transitivaj verboj: Il mabbamba (O) le betō (A) htesa. "The ball (O) the boy (A) chases." La dua estas plej ofte ĉe netransitivaj verboj : Li betō (S) tabllysan "The boy (S) weeps." Tamol (O) li betō" A child (O) the boy (S) [is]." La objekto povas esti kaj rekta, kaj prepozicia: Kyam (TO) euil zef (OO) le betō(A) vergo. "A book (TO) to the man (OO) the boy (A) gives." ["The boy gives a book to the man."] Aliaj kazoj estas analizaj. Plurala finaĵo estas -n: ytanney, ytanneyn, "foot, feet" fanttear, fanttearn, "dance, dances" pyttela, pyttelan, "color, colors". Poseda finaĵo estas -id: tohda betōid, "cat of a boy", "a boy's cat". La lingvo origine havis kategorion de genro, sed tiu dum evoluo malaperis, restis nur natura genro. Speciale listigitaj estas maskulinaj kaj femininaj nomoj de bestoj. Ekzistas ankaŭ antikvaj substantivoj Nenddeylt, venantaj el tradicia dialekto, kiuj havas specialajn klasojn por indiki aĵojn, bestojn ktp. Ili estas neregulaj kaj havas apartajn finaĵojn. Same detale estas ellaborita la sistemo de pronomoj, inkluzive de retrofleksiaj : Le nantry la mesōl ely ke, send etsa il ouar ely tralttrama. The mother saw her daughter and she greeted her (same greeted other). Eĉ pli komplika estas la verba sistemo: Ekzistas tri grandaj kategorioj: -rem, -ned kaj -ndi, ĉiuj en volitiva, nevolitiva kaj ambivolitiva formo. Prezenco, pasinteco kaj futuro havas formon simplan kaj progresivan, en la aspektoj kutima, kompletiga kaj inĥoativa, ekzistas mediopasivo, refleksivo kaj posesiva aspekto fremdiga kaj nefremdiga. Ekzistaj modalverboj kaj helpverboj, kaj krome gerundiaj konstrukcioj progresiva, pasiva, potentiva kaj aptitiva. La verboj esprimas tempon kaj aspekton per prefiksoj algluitaj al la pronomo, ekzemple "mi manĝis" ry ennyvel iĝas elry ennyve.

Krom detale prilaborita gramatiko ankaŭ ekzistas Teonaht-Angla vortaro:

abnya, -n, /a'bi@/; n. DIVINE WILL, GOD'S WILL, GOD'S WAY; DIVINE PATH; PREDESTINATION. aco, -n, /atSo/; n. FAULT, VICE, BAD HABIT; SIN; SHAMEFUL THING. acodel, /atSodEl/; adj. SHAMEFUL, VICIOUS, FAULTY. ad, /ad/; 3rd pers. plur. acc/dat. pron. THEM. adwe, /adwe/; alternative form: 3rd pers. plur. acc/dat. pron. THEM. adme, /adme/; stat. prep. AMONG, WITHIN, IN THE MIDDLE OF. admy, /admi/; mot. prep. AMONG, WITHIN, INTO THE MIDST OF. ahdken, /aĉkEn/; verb, ni, abs. form of -ndi.DIE. La nantry dely ahdken, "her mother died, her mother is dead." ahdkkendi, /aĉkEnd@/; verb, ni inf. BE DEAD. ahdkkendo, /aĉkEndou/; verb. nom. A DYING, A DEATH, DEMISE. ahdkent, /aĉkEnt/; verb. adj., DEAD, MUTE. ahstaf, /aStaf/; n. RAISIN, CURRENT. ahuo!, /ahjou/; expl., takes voc., HAIL; a greeting used ordinarily with or by God or ods: ahuo Yrlo, "Oh Lord"; Ahuo Marua, "Hail Mary." ai, /ai/; 3rd pers. sing. nom. inan. pronoun. IT. aiba, /aib@/; sing. dem. adj. THIS. aibba, /ai'ba/; sing. dem. adj. THIS. aid, /aid/; 3rd pers. sing. neuter inan. poss. pron. ITS.

Ursula Kroeber Le Guin

estas nuntempe populara usona verkistino. Literaturkritikistoj metas ŝin sur la liston de usonaj klasikuloj. Ŝia patro estis antropologo, ŝia patrino verkistino, ŝia edzo franca historiisto, ŝi mem studis literaturon kaj artojn en Kolumbia Universitato, ekde 1958 vivas en Portlando en Oregono kaj verkas: poezion, prozon, sciencfikcion, fantazian literaturon, infanlibrojn, eseojn, tekstojn de kantoj, tekstojn por radioelsendoj. Ŝi publikigis ses volumojn da poezio, dudekon da romanoj kaj centon da rakontoj, dekon da libroj por junularo, kvar kolektojn da eseoj kaj kvar volumojn da tradukoj. Pli ol kvardek jarojn ŝi laboris sur la traduko de "Tao Te Ching" de Lao Cu. Tre ŝatata estas la porinfana serio "Catwings". Kelkaj el la libroj de Ursula Le Guin estas daŭre reeldonataj dum pli tridek jaroj kaj estis tradukitaj en 16 lingvojn. La plej konata estas ŝia kvarvoluma verko „Books of Earthsea”, kiu komencis

la serion de fantaziaj libroj. Kiel unu el la bazaj kaj gvidaj verkoj por la tuta ĝenro de scienca fikcio estas konsiderata ŝia libro "The Left Hand of Darkness", la plej bonaj utopiaj verkoj estas "The Dispossessed" kaj "Always Coming Home". Ursula Le Guin ricevis plurajn literaturajn premiojn kaj ordenojn. Ŝi havis kuraĝon preni serioze la literaturajn formojn, kiujn oni antaŭe opiniis malpli valoraj, nome sciencfikciaj kaj fantazian literaturon, kaj iĝis pro tio fama kaj respektata. Pri la verko "Gifts", kiu ricevis PEN-premion, la ĵurio skribis: "*Gifts confirms Ursula Le Guin's ability to invent a country where the natural and supernatural seem both harrowing and mundane. In the Uplands, families fear one another because of their inherited gifts: the power to destroy both enemies and kin with 'a glance, a gesture, a word.'* The book asks a question of great moral weight:..." (www.ursulaklequin.com/ , www.ursulaklequin.com/ukl_info.html)

En la libroj, kie aperas eksterteranoj, troviĝas specimenoj de pluraj fantaziaj lingvoj, ekz. de Segoyanoj, Athshianoj kaj Odonianoj. En "Always Coming Home" estas (angle) klarigataj kelkaj vortoj el la lingvo "Kesh", kiel ekzemple:

dirats blood. To bleed.

heyimas the building (variously evolved from a basic pattern of five-sided underground room with four-sided pyramidal roof) where the activities of one of the Five Houses of Earth took place. The "Right Arm" of each Valley town consisted of the five heyimas laid out in a curve around the dancing place.

TOK a computer language taught to all human programmers by the Exchanges of the City of Mind, and used in spoken and/or written form as a lingua franca among human beings of different languages.

wudun exchange, transference. some forms of barter. To exchange. The Exchange (computer terminals of the City of Mind).

yowai coyote (Canis latrans).

Valeska Scholl

estas kun siaj 11 lingvoprojektoj *Drow, Etor, Kaliso, Kir, Ley Arah, Ilushan, Musbrek, Neitetar, Psharádi, Tsaran*, kaj *Neitetar* la plej lingvokreema virino en la interreto. La lingvoj aperas en ŝiaj fantaziaj, filozofiaj kaj sciencfikciaj verkoj. En siaj retpaĝoj <http://www.jashan.net> , <http://www.jashan.net/sites/conlangs> ŝi uzas nomon „Jashan“, kio en ŝia preferata lingvo Tsaran signifas „krepusko“, ankaŭ metafora krepusko signifanta lumon inter du baraĝoj, kaj ankaŭ vivĝojon. Jashan estas mense forta persono kun firmaj opinioj, ŝi ŝatas riskojn kaj riskajn ludojn en la reto. Ŝiaj rakontoj, prezentataj en interreto kiel „legendoj“ havas ofte misterajn, filozofiajn kaj erotikajn temojn. Krome ŝi ŝategas lingvojn kaj „lingvajn viziojn“ do la psikologian flankon de lingvistiko, kaj la manierojn, kiel homoj el diversaj kulturoj tra lingvoj esprimas siajn nociojn. Ŝiaj lingvaj proponoj estas diversaj, kelkajn ŝi opinias lingvojn de diabloj, feoj aŭ aliaj kreaĵoj, kelkaj estas „mortintaj lingvoj“. La plej ellaborita estas la lingvo Tsaran kaj ties nova versio Psharádi.

La civilizo de la Tsaran-popolo estas proksimume 1900-jara, kun pluaj evoluperiodoj. Dum la unua periodo inter la jaroj 100 kaj 400, la malgrandkorpaj tsaranoj vivis en triboj kiel nomadaj ĉasistoj, kun rakontoj, mitoj kaj legendoj el antaŭskribaj tempoj. Dum dua periodo, en la jaroj 400-700, la triboj enloĝis fiksjajn setlejojn en Eŭropo, fondis urbetojn, produktis ilojn, evoluigis agrikulturon, medicinon kaj skriban sistemon. Komence de la tria periodo, kiu daŭris de 700 ĝis 900, venis atakoj de popolo Pomeille (t. e. blankuloj), kiuj estis grandaj kaj blondaj, opiniis sin rase superaj kaj formurdis ĉ. duonon de tsaranoj. La alia duono, forpelita de siaj urboj, rekomencis nomadan vivon kaj konservis nur malmultajn skribajn dokumentojn. La kvara periodo (jaroj 900-1100) servis al kultura revivigo kaj rekresko de la literaturo, dum la tsaranoj konscie izoligis sin de fremdaj influoj. Inter 1100-1400 (la Romana periodo) ili loĝis en okcidenta Francio kaj estis influitaj de la tiamaj latinidaj kulturo kaj lingvo, kvankam ilia literatura lingvo restis pura. Ĉirkaŭ 1400, dum la epoko de

krucmilitoj, tsaranoj rifuzis kristanismon kaj fuĝis en Anglion, kie ili sektece vivis ĝis la 18-a jarcento. En la jaro 1702 ili decidis, por survivi kiel tuto, elmigri al Ameriko, kaj venadis kun francaj kaj britaj ŝipoj al Nova Anglio. Tie ili havis pli bonajn kondiĉojn por refondi la tradiciajn komunumojn, trovi sian popolan kaj kulturan identecon, konservi sian lingvon kaj instrui ĝin al infanoj. Ili poste komencis rase intermiksiĝi kun usonanoj, sed la infanoj estas opiniataj Tsaran ĉiam, se ilia patrino estas Tsaran. En la dudeka jarcento ili adaptiĝis al usona civilizo (kun televido kaj interreto). Nun ili vivas, en la nombro de ĉ 5000 homoj, en nordorienta Usono, klopodante konservi siajn tradiciojn.

Ankaŭ la lingvo transiris kelkajn periodojn. La malnova havis forte aglutinan strukturon kun ĝis sepsilabaj vortoj kaj multaj sufiksoj, kun inkluziva kaj ekskluziva pluralo, V-S-O sintakso kaj numeralo sistemo bazita sur naŭ. Oni lernas ĝis simile kiel la Latinan en Eŭropo. Specimeno: *Selah'dais isalem arapahjes uun arah, oi'eldahel isalem arapahjes rogana* (Long ago the whole world had one language, and the people had a common speech). En la meza periodo okazis ŝanĝoj, mallongigo de vortoj, pli analiza gramatiko, reguligo de afiksoj kaj S-V-O sintakso. La diftongoj simpliĝis al sia komenca vokalo, kio forte influis la sistemon de pronomoj. Du specimenoj, de komenco kaj fino de la meza epoko: *Seladais is arapjhes un ara, o'eldahel is arapjhes rogana*. (Early Middle) *Selade as aravajhis un ara, o'eldahel as aravajhis rowana*. (Late Middle). Ĉar tsaranoj post la atakoj de Pomeille vivis diese, okazis dialektiĝo: *Selade as aravajhis un ara, o'eldahel as aravajhis rowana*. (Late Middle Eastern Tsaran). *Ara cojhes seladas is un ara, o'ara cojhes rogana ela is*. (Late Middle Western Tsaran). La lingvo plu evoluiĝas kaj reguliĝas. La nuna parolata formo nomiĝas Psharádi kaj estas influita de eŭropaj lingvoj. Ekzistas lernolibro de Psharádi kaj kelkaj tradukoj. Jen specimenoj:

Conversation One:

Dísa: Hravé, Zháni.

Zháni: Hravé, Dísa. Lwim ta ayán adí?

D: Mad, she t'apés. Haná tu?

Zh: Mad.

Dick: Hello, Jane.

Jane: Hello, Dick. How are you today?

Dick: Good, thank you. And you?

Jane: Good.

Conversation Two:

Bálin: Hravé, Dísa. Lwim ta ayán adí?

Dísa: Hravé, Bálin. Ma ayán adí mad.

B: Dísa, h'ac adí Su.

D: Hravé, Su. Plivé de te cedélu.

S: Hravé, Dísa. Haná plivé de te cedélu.

B: Hello, Dick. How are you?

D: Hello, Bob. I'm fine.

B: Dick, this is Sue.

D: Hello, Sue. Nice to meet you.

S: Hello, Dick. Nice to meet you, too.

The Tsaran Language Translations - "Tower of Babel" - Comparative

Modern Tsaran

Seládé a árazhi un ára
haná pséuna árazhi róya.

Con éla urrozh
indrámon, is salízh sin
dan éwa Shinár haná se
rézh róya cha lor cin.

Is i arálizh, "Ecú! No
ronin gravíla haná cos fa
is cri win lu tash is
devón tárové." Is bi
gravíla chíma tála haná
gedán chíma fisá.

Middle Tsaran

Séládas is árápájhes un ára
ó'éldáhél is árápájhes rogáná.

Lwév éldáhél urrujh éndráná,
salejh zu síná nép tá dí-Shínár
ó'révájh vu che jhu cénté.

Árálejh zu cé jhu'ecsá, "Náv!
Roínen zá áqá chén curál
'najen lus tásh osátan zu
s'rep." Najejh zu áqá chén
curál chémrá ó'tásh lás zu
drájheo.

English

Now the whole world had one
language and a common
speech.

As men moved eastward, they
found a plain in Shinar and
settled there.

They said to each other,
"Come, let's make bricks and
bake them thoroughly." They
used brick instead of stone, and
tar for mortar.

4.3.2. Ekzemploj de Artlang-kolektivoj (mikronacioj)

Helpe de interreto eblas, ke ajna uzanto lanĉu sian elpensitan lingvon inkluzive de ties virtuala parolantaro. Se ĝi plaĉas al aliaj uzantoj de interreto, ili aliĝas kaj pluevoluigas – ĉu nur la lingvon, ĉu ankaŭ la lingvan komunumon.

Tio estas, por montri ekzemplon, la kazo de *Jameld*, ekkonstruita 1982 „por persona amuzo kaj kleriĝo“ de James Campbell, kiel nova ĝermana lingvo, parenca kun la Nederlanda, la Frisa kaj la Germana, kune kun fikcia novĝermana kulturo kaj komunumo: *Jameld jist an artalangui, an langui tes wä dessini -- int te kase eri, vor personlauk yanohit und birightafē, und vor untersoken was jist maklauk und wau langui funkton int an familiari böyayibin* (wj. *és an wénsemi lith ew te Germanifē languifamil, biwandi met Nederaz, Frisfē und Détfēaz*). *T'artalangui jist jund an ram vor an embrionifē fiktivi kultür und ans rēzlaami humör tes wä bui böya iet.* (Originala traduko: *Jameld is a constructed language, which has been designed - in this case for personal amusement and enlightenment, and to explore the possibilities and workings of language within a familiar environment /viz. as an imaginary member of the Germanic language family, related to Dutch, Frisian and German/. It is also the framework around which an embryonic fictional culture and some astonishingly lame humour have been assembled.*) 2001 aperis „*Jameld Microphrasebook*“, krome ekzistas *Jamelda-Angla* kaj *Angla-Jamelda* vortaro kun ĉ. 6000 vortoj, gramatiko kaj fonetiko, reeldonitaj en 2005. Inter 1992 kaj 1997 eldoniĝis en *Jameld* interreta revuo *Zolid Matters*, kies nomo konserviĝis en la titolo de la hejmpaĝo (www.zolid.com/zm/) de la ĉ. tridekmembra lingva komunumo *te Binertglobakläi Jameld Zolidaton* (the World *Jameld* Association). La malnovaj eldonoj de la revuo, protokoloj el kunsidoj, afiŝoj por asembleoj kaj renkontiĝoj de *jameldanoj* troviĝas en la reta arkivo, krome oni trovis blogojn, fotopaĝojn, vojaĝpriskribojn kaj reklamojn en aŭ pri *Jameld*.

La plej fama ekzemplo de kolektiva interreta lingvofikcio estas la *Talossa lingvo* (el Gilhep Talossán, vidu ekz. http://en.wikipedia.org/wiki/Talossan_language), kreita en 1980 de Usonano Robert Ben Madison por la reĝolando, kiun li formale estis fondinta en sia domo en Milwaukee. La vorto „*Talossa*“ venas el la finna lingvo kaj signifas „en la domo“, ĉar ĝi naskiĝis en la domo de Madison. Pri la lingvoevoluo:

La *arkaika periodo* de la lingvo estis 1980-1981. Tiu estis speco de pidĝino kun baza vortaro (substantivoj, pronomoj, numeraloj, konjunkcioj) venanta el la Franca kaj la Hispana, kun influo de portugala gramatiko. Lingvospecimeno el tiu periodo: *"Talossa nostreu c'estas almostemente uneu noveu landeu," said Kingeu Robert I todayeu. Uneu noveu Mapeu d'Talossa c'estas in "l'Libreu d'Talossa," a showar qu'l's-changeux in Talossa haveu estescu muy mucheux. "Havemos reachescu nostreu goaleu nationaleu, i estamos happyeux," said l'Kingeu.*

En 1981 komencis la *antaŭklasika lingva periodo*. La lingvo ricevis iom da ekzotikaj trajtoj el la finno-ugraj lingvoj (sistemo de kazoj) kaj de nordeŭropaj lingvoj. Specimeno: *"Qiñeu Diktatga, Talossaux Armeux havè changeascù c'ks. L'Qiñeu c'è pensescù l'ideaga plâcescù c'Armeux över l'flageu anstatt l'Symboleu Ben'u. C'armeux sà più bueneu lookînd als l'primeu."*

La *klasika talossa periodo* estis 1981-1983, kiam la lingvo liberiĝis de finno-ungraj influoj kaj strebis esti pli latinida. Ekestis gramatiko kaj vortaro kun 1700 vortoj. Specimeno: *Sverðeu d'Kérénszt fâçara os ideologiû formáus. L'Dûceu dellâ Partiá Sverðeu d'Kérénszt, Ben Madison, començara în viensâs ziuâs lâ discertação formál d'"L'Vej d'Sverðeu d'Kérénszt," l'plán formál és ofiçial dellâ noastrâ Partiá. Acest llibriteu estara l'aşinmêteu grült pëlla Claßeu regesc "Pistoriá Mondial."*

En la *postklasika periodo* 1983-1985 firmiĝis la latinida ĥaraktero per aldono de elementoj el la Rumana kaj la Romanĉa. Ekzemple la arkaika finaĵo –*çau*, venanta el la Portugala, ŝanĝiĝis al –*ziun*. Kreiĝis CÚG, *La Comitâ përl'Útzil del Ghlîmbâ*, komitato por la uzo de la lingvo: *"Bunâ, aici-st noastrâ pîmalaiset 'ezitoriál' illa ghlîmbâ Talossán, come*

comandescù par l'Regeu. Zespäts la nataschâ-d CÚG, pâ-l 29 Novîmbâr 1983, la CÚG rescherscheva l-problüm phonetic Talossán, és est prideascâ ànonçar l-list sovînd della phoneticâ dellâ glhîmbâ."

La reĝolando havis pli da loĝantoj, do, oni komencis fari historiajn studojn, malkovrinte, ke la prauloj de Talossanoj vivis en Eŭropo, en gaŭla urbo Tolossa (Toulouse). Sed poste la arĥeologoj eltrovis, ke la prakeltaj loĝantoj de okcidenta Eŭropo venis el norda Afriko, kie troviĝas berbera tribo Talesinnt, la plej antikva praŭlo de talossanoj. Tial ankaŭ la lingvo transiris 1985en la *kelto-berberan periodon*: la vorto por „lingvo“ iĝis kelta *el glheḥ*. Specimeno: *"Aĉest editoriál promptescù isch par áis evînts reĉînts în an Oriînt-Çentrál. Come voi säpetzi d'ospréi an Zeclaraziun à shinistrà, eu sînt contra an idéa da therorizim."*

1985-1986 sekvis la *antaŭmoderna periodo*, la lingvo revenis al klasika formo inspirita per la Romanĉa kaj la Okcitana. Publikiĝis la Anglo-Talossa vortaro kun 4300 vortoj kaj libro „Historio de la reĝolando Talossa“ Fondiĝis „Talossa Nacia Partio“, kiu startis kulturan kaj politikan agadon por nacia identeco: „Ŭc, c'è vräts, el Talossán entra'l atx del fütür. És sâ rapidamînt, aĉest entréia! »

La *moderna periodo* daŭris 1986-1990, kiam estis ellaborita duvoluma vortaro Anglo-Talossa kaj Talossa-Angla kaj la lernolibro por memlernantoj. Robert Madison verkis longajn artikolojn kaj poemojn en la Talossa. Komencis la literatura periodo.

La periodo 1990-1994 estas nomata *novklasika*: tiam la lingvo tendencis reveni al siaj etnaj fontoj, eldoniĝis duvoluma *Treisoûr del Glhetg Talossán* (Trezo de la talossa lingvo), aperis pluaj poemoj, artikoloj kaj tradukoj, kiel tiu el la biblio : « *Txec, ün servesc da Dîeu és del Segñhôr Iésu-C'hriost, àls dudësch tribâs dal tvistraziun: Dîeu t'alegra! En consideretz come la pür aleretzâ, quândevri dals diviârsen tentaziuns voi ec'hperistent.* »

En la jaro 1994 la gvida politika partio de progresema konservativuloj ŝanĝis sian nomon al *els Tamoráes da Fiál* (batalantoj del destino). La vorto “tamoráes” venas el la berbera, kaj fakte, baldaŭ grupo de civitanoj startis iniciaton, kiu finis per oficiala ŝtata proklamo, ke talossanoj estas nacio iel parenca al berberoj. Historia verko “*La berbera projekto*” rakontis la tutan genealogion, kiel la Talossa dispartiĝis desde la Latina dum la Romana koloniigo de norda Afriko kaj kiel la tieaj loĝantoj poste fuĝis al Ameriko.

En la lasta, *stabiliga lingvoperiodo*, regata de interreto, la Talossa iĝis vivanta (parolata kaj skribata) lingvo. 1996 aperis la dua, prilaborita eldono de la gramatiko *La Scúrznîâ Gramáticâ del Glheḥ Talossán*. La unuaj parolantoj de la lingvo formis la patriotan grupon *Ladintschen*. Krom pluraj retaj paĝoj fondiĝis *Telaragñhâ Mondial*, interneta radiokanalo en la Talossa. Sekvis du aliaj, *Las Penetrontâs* de Robert Madison kaj *Rádieu Ladintsch* de Thomas Leigh. 1998 aperis la dua, plilarĝigita eldono de *Treisoûr del Glheḥ Talossán* kaj *Corpus Scriptionum Talossanarum*, dokumentanta la kompletan lingvoevoluan. 1999 eldoniĝis verko pri historio de la lando *Ár Päts* (Nia lando). La lingvon plu prizorgas CÚG, *La Comitâ pèr l'Ŭtzil del Glheḥ* (Komitato por la uzo de la lingvo). Ĝiaj plej famaj membroj, kiuj nomiĝas talosse Rôibeard Donatüs, Chirischtôval Lauramáintsch kaj Tomás Gariĉéir, skribas multajn artikolojn kaj tekstojn en kaj pri la Talossa.

La lingvo estas uzata en la *Talossa reĝolando* (El Regipäts Talossán), <http://starship.python.net/crew/manus/talossa/>, kiun fondis entusiasmuloj el Wisconsin, postioe aldoniĝis sesdeko da civitanoj el Kanado, Eŭropo, Sudameriko, Azio kaj Afriko. La konstitucia monarkio estas regata de la reĝo. Por la funkcioj leĝdona, juĝeja kaj ekzekutiva estis ellaboritaj reĝaj oficejoj. Ĉiuj civitanoj estas nobeluloj, eminentaj civitanoj ricevas ordenojn kaj apartajn titolojn (Cnecht, Barôn, Conta, Düc). Ili „servas al sia nacio“ uzante kaj ellaborante la lingvon, kreante literaturon kaj kulturon. En la reto oni informas pri ĉiuj gravaj eventoj, precipe pri politikaj, diplomaciaj kaj kulturaj okazaĵoj.

Kiel oni povas vidi sur interreta paĝo <http://www.kingdomoftalossa.net/>, la lando kuŝas ĉe la Talossa maro, konsitas el provincoj *Atatürk* (kie estas la ĉefurbo Abbavila), *Cézembre*, *Mussolini*, *Vuode*, *Florenciâ*, *Maricopa* kaj *Maritiimi Maxhestic*. Ĉiu provinco

havas sian konstitucion, flagon, estraron kaj entute siajn specifaĵojn, ĉiuj eventoj en unuopaj provincoj estas en la reto detale priskribataj kaj aktualigataj. Al la imperio apartenas ankaŭ la antarktida pinguinprovinco *La Teritôriâ Antárctic da Pengöpäts*. Ankaŭ ĝi havas sian propran flagon, blazonon kaj kutimojn. Ĉar tiu ĉi provinco estas ege granda kaj ne havas najbarojn, oni povas tie plej bone praktiki la nacian sporton, automobilan glacikuradon, kiu okazas ĉiujare la 25-an de februaro.

Oni krome trovas precizajn informojn pri la ŝtata flago, blazono, himno, slogano, popolaj kutimoj, naciaj kantoj, naciaj festotagoj, famaj pilgrimlokoj (ekzemple greka restoracio en la provinco Florenciâ), pri gravaj historiaj eventoj, pri oficialaj sportaj kluboj, precipe la basketbala, pri naciaj kinejo kaj televido, famaj homoj, kutimaj manĝaĵoj kaj specialaĵoj (kuskuso) ktp. La plej grandaj *politikaj partioj* estas la konservativa „Parti Conservatiu Fidistâ“, la unilaterala „Parti del Movamâintsch Fortúpt és Vienstaterâl“ kaj la revolucia „La Mhà Nheagrâ“ (Nigra Mano) – iliaj konsisto, celoj, ideologio kaj agado estas detale priskribitaj. Same detale oni povas legi pri historio de la ŝtato, konatiĝi kun ties konstitucio, leĝoj ktp. La gravecon de la talossa lingvo por la nacia konscio esprimas la nacia himno “Chirluscha àl Glheþ” (Odo al la lingvo), kiun verkis Robert Ben Madison en 1992:

Sta là, zefença tú vell glheþ Talossán.

Txamáis praitença da negar tú drept yumán.

És ca'scù ziuâ, ár propreu glheþ parlar;

Sovenenç' la tzarâ, Talossán c'è ben d'estarë.

Va, desavërscha Talossán sê grült travál.

Acest daþerc'ha ár voce naziunál!

Glheþ da Talossa aprenda, parla, scriiti;

fäts aceastâ cosâ, eda resta incognits!

Noi sînt l'espereux dad ár anciînt glheþ cortéis.

Mîntenença sondreux toct ár cüinsvetüds vis-chéis!

Oxhi sonora la pliadâ antaloûr:

“Crid' cadascù þorâ që eu non sînt Cestoûr!”¹³

Ve, la talossanoj ne vivas en kompleta paco. Post dudeko da jaroj, dum kiuj estis ellaboritaj talossa lingvo, kulturo, civilizo, politiko kaj diplomacio, venis ideologiaj kaj politikaj malsamopinioj kaj kvereloj. Tiuj, kiu ne estis kontentaj, fondis en 2004 respublikon (La Repúblicâ Talossán) kun propra interreta paĝo <http://www.talossa.com/>, ne malpli detale ellaborita ol tiu de la reĝolando. Ilia nacia projekto estas interreta vortaro Talossán-Angla kaj Angla-Talossán, havanta jam 28 000 vortojn. Krome ekzistas „La Icastolâ“, lernejo de talossa lingvo ĉe la Talossa Akademio de Artoj kaj Sciencoj, fondita en 2005 pro la decido de la republika parlamento. Tre profesia estas ilia interreta revuo Qator Intríns, kiu alportas novaĵojn el la republika vivo, inkluzive de desegnaĵoj kaj fotoj. Krome ekzistas pluraj interretaj paĝoj de aliaj talossanoj, kiuj vivas en diasporo, ekzemple konzervativa „Talossan Émigré Community“ sur <http://my.execpc.com/~talossa/>. La talossanoj sentas sin mem kiel nacio, sendepende en kiu komunumo ili vivas. Ilia lingvo ludas gravan por ilia nacia identeco.

Talossanoj apartenas al mikronacioj, kiuj estas registritaj en interreto ekzemple per OIK (Organisation für International Kartografie) sub <http://oik.virtuacom.de>.

La kolektiva flegado de conlangas estas nova kultura fenomeno specifa por interreto. La elfaj lingvoj de J.R.R. Tolkien estis post 1955 konataj nur al legantoj de liaj romanoj: la interreta organizaĵo *Elvish Linguistic Fellowship* (<http://www.elvish.org>), fondita 1990, havas kelkcent membrojn en la tuta mondo, abonantojn de revuoj „Vinyar Tengvar“ kaj „Parma

¹³ Traduko: Staru ĉi tie, defendu vian malnovan talossan lingvon. Neniam provu nei vian homan rajton. Kaj ĉiun tagon parolu nian propran lingvon; anoncu al la mondo, ke esti talossano estas bone. Iru, transprenu tiun grandan talossan laboron. Tio revivigos nian nacian voĉon. Lingvon de Talossa lernu, parolu, skribu; faru tiun aferon, aŭ restu nekonata! Ni estas espero de nia antikva kortuma lingvo. Konservu ĉiujn niajn valorajn kutimojn! Hodiaŭ sonu kuraĝa voko: “Kriu en ĉiu horo, ke mi ne estas usonano!”.

Eldalamberon.“ Oni legas tie: “*Ĉio komencis kun la folio kaptita en la vento, kaj ĝi iĝis arbo, kaj la arbo kreskis, lanĉante multnombrajn branĉojn kaj disvastigante la plej fantaziajn radikojn.*“

5. Fina rimarko

Conlangs estas tipa produkto de anglalingva komunumo. Tiu ĉi, ĉefe en Usono, jam posedas internacian lingvon, tial oni lernas aliajn lingvojn ne pro neceso, sed pro intereso. J. R. R. Tolkien kun la elfaj lingvoj en “Mastro de l’ ringoj” kaj Marc Okrand kun la Klingona en “Stela Vojo” lanĉis novepokan ondon de intereso pri lingvokreado por estetikaj celoj, Jeffrey Henning faris el ĝi “salontaŭgan” hobion kaj “Language Creation Society” levis ĝin al la statuso de lingvistike orientita kolektiva aktiveco. La plej gravan rolon en tiu ĉi evoluo ludas la interreto, potenca ilo, ebliganta al sennombraj lingvoamantoj publikigi, disvastigi, pridiskuti kaj reage al respondoj prilabori, plibonigi au entute forigi kaj anstataŭigi siajn projektojn. Tio validas ne nur por lingvohobiemuloj, kiuj kreas siajn proprajn mondojn kaj tien apartenantajn lingvojn, sed ankaŭ por “novaj zamenhofoj”. Ĉe Duliĉenko (1990) estas registritaj proksimume 1000 projektoj, kiuj sume aperis en tempospaco de preskaŭ du jarmiloj. Sed nur dum la lastaj dudek jaroj, kiam la homa socio estas regata per interreto, estis kreita milo da novaj helplingvaj projektoj, kaj senpaŭze aperas novaj. La merkato pri helplingvoj jam estas pli ol satigita, la tentado tamen estas tro granda, se oni tiom facile kaj eĉ anonime povas prezenti al la homaro sian propran inventon. Interlingvistiko, kiel scienco pri planlingvoj, ne povas ignori tiun ĉi fenomenon.

Oni demandas sin, ĉu interlingvistiko koncentriĝu nur al la tradicia kampo de auxlangs (se ili entute estas “seriozaj” – kaj kiu decida pri la seriozeco?), aŭ ĉu ĝi pro lingvistikaj kialoj ankaŭ interesiĝu pri engelangoj kaj artlangoj? Ili ja estas lingvoj, do almenaŭ teorie ili apartenas al la sfero de lingvistiko. Kompreneble, estas facile refuti ĉiujn conlangs kiel aferon neseriozan kaj nesciencan, praktike ne uzeblan ktp., sed ankaŭ eblas almenaŭ priesplori kaj prikomenti ilin. Ĉiukaze, conlangs estas aktuala, specifa fenomeno, kiun ne eblas ignori.

Literaturo:

Barandovská-Frank, Věra (2003): Archiv- und Wekstattseiten für Plansprachen im Internet. In: Blanke, Detlev (eld.). Plansprachen und elektronische Medien. Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 6.-8. Dezember in Berlin. GIL, Berlin, p. 9-39

Barandovská-Frank, Věra (2009): Interreta lingvokreado kaj interlingvistiko. grkg/Humankybernetik 50/3, p. 151 - 168

Blahuš, Marek (2011): Toki Pona: eine minimalistische Plansprache. In: Sabine Fiedler (eld.): Spracherfindung und ihre Ziele, Beiträge der 20. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 26.-28. November 2010 in Berlin. GIL Berlin, p. 51-55

Maxwell, Daniel Newhall (1992): Ekinteresiĝo pri planlingvoj en Usono. grkg/Humankybernetik 33/4, p. 147-150

Дуличенко, А. Д. (1990): Международные вспомогательные языки. Валгус, Таллинн

Duliĉenko, Aleksandr D. (2010): Tezoj pri slava interlingvistiko. En: Blanke, Detlev k. Ulrich Lins (eld.): La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, p. 206-208

Janich, Nina (2004): Sprachplanung. In: Knapp, Karlfried et al. (eld.): Angewandte Linguistik. Ein Lehrbuch. Tübingen und Basel, A. Francke Verlag, p. 481-501

Meissner, Boris (1977): Der sowjetische Nationsbegriff und seine politische und rechtliche Bedeutung. In: Jahrbuch der Albertus Universität zu Königsberg /Pr., Duncker&Humblot, Berlin, p. 103-140

Merunka, Vojtěch (2010): Jazyk novoslovienskij. ISBN 978-80-87313-51-0. Výrobce: Nová Forma s.r.o. (<http://www.stahujknihy>)

Pei, Mario (1958): One language for the world, and how to achieve it. Devin – Adair, New York

Wüster, Eugen (1931): Internationale Sprachnormung in der Technik. Besonders in der Elektrotechnik. VDI, Berlin

La adresoj de konsultitaj retpaĝoj troviĝas en la teksto. Kelkaj estas alireblaj (aŭgusto 2012) nur tra interreta arkivo, aŭ tra serĉilo de <http://www.babelsearch.at/>

Demandoj (bv. koncize respondi al vera.barandovska@uni-paderborn.de):

- 1) Kion signifas la mallongigo “conlangs”?
- 2) Kiu termino, enkondukita en 1931, proksimume sinonimas kun “conlangs”?
- 3) Ĉu la termino “conlangs” rilatas al speicala konstrumaniĝo aŭ konstrucelo?
- 4) Kiam komenciĝis intereso pri conlangs en interreto?
- 5) Kiuj estas “conlangers” kaj kio estas ilia kutima komunikadlingvo?
- 6) Kial la interreta conlangumado pleje floras en Usono?
- 7) Por kio utilas la unua enretigita eseo de Donald Harlow “How to Built a Language”?
- 8) Kion celis fari Christopher Bogart en sia retpaĝo en la naŭdekaj jaroj?
- 9) Kio estis Projecto Auxilingua?
- 10) Laŭ kiu principo estis listitaj conlangs ĉe Richard Kennaway ?
- 11) Kio estis Langmaker? Kiun meriton havas Jeffrey Henning?
- 12) Kiom da projektoj proksimume enhavis Langmaker?
- 13) Kio apartenas al profesiaj servoj de/por conlangers?
- 14) Kio estas “Language Construction Kit” ?
- 15) Kio estas la plej granda posteulo de Langmaker ?
- 16) Kiel karakterizas Esperanto-Vikipedio « planlingvojn » ?
- 17) Kio estas ĉentradukoj?
- 18) Kiaj homoj fondis Language Creation Society (LCS) kaj kiucele?
- 19) Kio okazas dum la realaj konferencoj de LCS ?
- 20) En kiujn kategoriojn oni krude dividas conlangs laŭ la celo?
- 21) Kiuj estas la plej grandaj grupoj de auxlangs?
- 22) Kial oni en interreto imitas la Romanan Imperion ?
- 23) Nomu kelkajn Romanceconlangs.
- 24) Kial popularas slaviconlangs?
- 25) Kio kunigis la slavojn en la naŭa jarcento ?
- 26) Kio estas panslavismo ?
- 27) Kiun conlang kunaŭtoris la esperantisto Ladislav Podmele?
- 28) Kio estas esenco de la lingvoteorio de Nikolaj J. Marr?
- 29) Kio estas zonaj lingvoj?
- 30) Kiel krude dividiĝas slaviconlangs? Nomu kelkajn.
- 31) Kial, viaopinie, popularas Slovio?
- 32) Sur kiuj lingvoj baziĝas Glosa ?
- 33) Kio estas Earth Language ?
- 34) Kion celas Toki Pona?
- 35) Al kio specialiĝas Láadan?
- 36) Kio estas artlangs? Nomu ekzemplojn.
- 37) Kio estas mikronacioj?
- 38) Kion kaj kial kreis Robert Ben Madison?
- 39) Al kiuj lingvoj tipologie apartenas la Talossa?
- 40) Kial estas conlangs gravaj por virtualaj komunumoj?